

*Parto 7:*

*Interlingvistiko  
kaj esperantologio  
(diversaj planlingvaj  
temoj)*



## **INTERLINGVISTIKO KAJ ESPERANTOLOGIO (diversaj planlingvaj temoj)**

*Enkonduko:*

En ĉi tiu parto de la enciklopedio, titolita 'Interlingvistiko kaj esperantologio' (diversaj planlingvaj temoj), oni trovas informojn kaj artikolojn pri interlingvistikaj kaj lingvistikaj temoj, kiuj ne trovis lokon en la antaŭaj enciklopediaj partoj. Ĉi tiu parto de la enciklopedio do unuflanke raportas, en alfabeto ordo, pri efemeraj planlingvaj projektoj kaj donas sciigojn pri centraj interlingvistikaj institucioj kaj organizaĵoj, aliflanke ĝi prezentas personecojn, t.e. ĉefe sciencistojn-lingvistojn, kiuj ludis gravan rolon en la interlingvistika diskuto aŭ aplikadis plurajn planlingvojn samtempe.

En la ĉefa svisa volapüklingva gazeto *Schweizerpost / Jveizapot* (Zürich) aperis en majo 1890 interesa artikolo, verkita supozeble de d-ro Konrad Meisterhans. En ĉi tiu artikolo estis rakontite, ke la unua mondlingva sistemo publikigita en Svislando estis la verko de profesoro (?) H.J.F. Parrat, *Langue simplifiée*, en Porrentruy en 1858 (aperis du eldonoj). La aŭtoro deziris demonstri, ke oni povas krei neŭtralan universalan lingvon sur la bazo de la hind-eŭropaj lingvoj. La dua eldono estis germanigita far J. Matthys kaj publikigita sub la titolo *Stöchiophonie oder vereinfachte Sprache* (Solothurn 1861). En 1884 aperis alia projekto de neŭtrala universal lingvo: *El lina kosmana* = lingvo universal, far W. Juhle en Davos/GR. La titolo de la verko estis: *Weltsprache in Sprech- und Sprachunterrichtsbriefen für das Selbststudium*. En 1888 aperis en Zürich la verko de s-ro F. Friedrich, *Kakographie im XIX Jahrhundert*. Priskribo pri tio aperis en la periodaĵo *Volapükafleŝen jveizik* en 1889. Fako estas tamen, ke neniu el ĉi tiuj projektoj estas kompareblaj kun la tiam ekzistanta Volapük, skribis d-ro K.M.

## **ABLEMONDE (lingvo, 1932)**

Efemera aposteriora planlingva projekto sur romanid-ĝermana bazo, ellaborita de iu *Gustav Schwarz* kaj publikigita sub la titolo *Klefo di Ablemonde* en 1932 en la revuo *Interlinguages* (n-roj 49 kaj 50, Paris 1932).

*Specimena teksto:* Ablemonde vice able la lo monde; boko di la mondo, mondoboko; arbepome vice pomale: pomiero; veneruje vice rujeste: redijar. Lo anje soy dije la lu: no tim nokos! Mi nunse vu une novam ko vay porte la omne poblor un grande joyonte.

Bibl.: G. Schwarz: *Klefo di «Ablemonde»*. En: *Interlinguages*, 50/1932.

## **ANTIDO I (lingvo, 1907)**

*Antido I:* Temas pri la unua el multaj reformprojektoj sur la bazo de Eo, detale ellaborita en la tempo de la Ido-skismo far → *René de Saussure* (1868-1943; kiu mem uzis la pseŭdonimon Antido) kaj publikigita en *Antido I, Saussure, R. de, Grammaire élémentaire de la Langue Internationale avec recueil d'exercices / Elementala gramatiko de la Lingvo internaciona kun exercaro di Antido*, Genève 1907 (2a kaj 3a eld. 1907). Ĉi tiu aposteriora projekto (dediĉita al „nia glora majstro Zamenhof“) estas provo de kompromiso inter Eo kaj Ido. Temas pri reformo de la ortografio, grafiko (forigo de la supersignoj), vortfarado kaj parte ankaŭ de la gramatiko (ĉefe pluralo de la substantivo kaj akuzativo).

Ŝanĝoj kompare kun Eo: *w* anstataŭ *v*, *i* / *y* anst. *j*, *j* anst. *ĝ*, *sh* anst. *ŝ*, *e* anst. *kaj* ktp.

*Specimena teksto:* Vidwino havis du filinojn. La pli malyuna estis tiel simila al la patrino per sia karaktero e vizajo, ke chiu, kiu shin vidis, povis pensi, ke li vidas la patrinojn; ishi ambai estis tiel malagrablai e tiel fierai, ke oni ne povis vivi kun ili. La pli yuna filino, kiu estis la plena portreto de sia patro lau sia boneco e honesteco, estis krom tio un el la plei belai knabinoj kiujn oni povis trovi.

Bibl.: R. de Saussure: *Grammaire élémentaire de la Langue Internationale avec recueil d'exercices. Elementala gramatiko de la Lingvo internaciona kun exercaro di Antido*. Genève 1907.

→René de Saussure →Bibliografio


## ANTIDO II (lingvo, 1910)

Per *Antido II (Teoria ekzameno de la lingvo Eo kun fonetika internacia alfabeto sen supersigno sistemo Antido 2. Gramatiko, Ekzercaro kaj Krestomatia, Genève 1910)* →René de Saussure (1868-1943) prezentis iom prilaboritan version de Antido I. Kompare kun la ĉi-lastata, la nova varianta alportis modifetojn rilate la pluralon (pluralo de la substantivoj: *-n* anstataŭ *-i*) kaj akuzativon (formitan per la prepozicio *-i*). Ĉi tiu lingvo unufoje aplikis la principojn de neceso kaj sufiĉo, difinitajn de de Saussure.

Ŝanĝoj kompare kun Eo: reveno al *v* ĉe vidvino, *w* anstataŭ *ŭ*, akuzativo likvidita (akuzativa pluralo *-n* anst. *-jn*), *i'dome* anst. *hejmen* ktp.

*Specimena teksto:* Unu vidvino havis du filinon. La pli malyuna estis tiel simila al la patrino per sia karaktero kaj vizajo, ke chiu, kiu shi vidis, povis pensi, ke li vidas la patrino; shin ambaw estis tie malagrablan kaj tie fieran, ke oni ne povis vivi kun shin. La pli yuna filino, kiu estis la plena portreto de sia patro law sia boneco kaj honesteco, estis krom tio unu el la pley belan knabinon, i'kiun oni povis trovi. Kiam tiu chi bela knabino venis i'dome, shia patrino insultis shi, kial shi revenis tie malfrue de la fonto. „Pardonu al mi, patrino“, diris la malfelicha knabino, „ke mi restis tie longe“. Kay kiam shi parolis chi vorton, elsaltis el shia busho tri rozon, tri perlon kaj tri grandan diamanton.

En A. de Saussure tradukis la verkojn *La devo* de →Ernest Naville kaj *Aline* de C. Ramuz (ambaŭ Ĝenevo 1911).



Bibl.: R. de Saussure: *Teoria ekzameno de la lingvo Esperanto kun fonetika internacia alfabeto sen supersigno sistemo Antido 2. Gramatiko, Ekzercaro kaj Krestomatia*. Genève 1910; *Resumo de la teorio de Antido kun lingvaj kritikoj kaj klarigoj de konataj esperantistoj kaj idistoj*. Genève 1910.  
→René de Saussure →Bibliografio

## Tazio CARLEVARO

\*1945. Loĝas en Bellinzona TI



Post sia abiturienta ekzameno en la liceo de Lugano/TI en 1964 C., ŝtatano de Svislando kaj Italio, studis medicinon en la universitato de Zuriko kaj diplomiĝis en 1972. Specialiĝante pri psikiatrio kaj psikoterapio kaj plustudente en la laŭzana universitato, 1975-78 C. laboris kiel asistento en la ŝtata ambulatoria centro de Neuchâtel kaj de 1978 kiel ĉefkuracisto ĉe la loka tiĉina psikosocia servo. En 1980 li doktoriĝis en Zuriko. 1980-90 li laboris en propra kabineto, kie li okupiĝis cetere ankaŭ pri neŭropsikologio kaj kriminologio. De 1990 li estas direktoro de la nordtiĉina psikiatria sektoro. Krome li okupis diversajn postenojn en la psikiatria organizo en Tiĉino kaj tutsvislande. Apudprofesie C. okupiĝis pri jurpsikiatrio, epidemiologio, instruado, psikoterapio, patologia hazardludo. Regule li verkadis prifake por la tiĉina gazetaro, precipe por la tagjurnalo *Corriere del Ticino*, kaj por la radio kaj televido. C., kiu regas plurajn nacilingvojn kaj parolas la tiĉinan dialekton, ankaŭ politikumis en la loka leĝofara instanco kadre de la socialista grupo.

Kun siaj multflankaj intereso kaj kapabloj pri lingvistiko kaj planlingvoj C. fariĝis frue aktiva kaj konata en la interlingvistika movado. Li aprezas kaj aplikas samtempe plurajn planlingvajn sistemojn, tolerante ilian kunekzistadon unu apud la aliaj, kaj science esploras ilin kaj iliajn movadojn.

Sian planlingvan 'karieron' C. komencis en 1957/58. Laŭ rakonto de C. lia avo lernis siatempe Eon, kiun li plene forgesis. Li forlasis ĝin, kiam eksplodis la Ido-krizo. Tial C. malkovris ĉe li lernolibrojn de ambaŭ plan-

lingvoj. Sed li lernis unue Idon, ĉar la super-signoj de Eo malplaĉis al li, kaj ĉar la lernolibro de Ido estis pli maldika, t.e., Ido ŝajnis esti pli facila ol Eo. Lerninte Idon (laŭ la lernolibro de Louis de Beaufront de 1920), C. ricevis la Ido-diplomon pri instrukapablo. Krom Ido kaj Eo C. enprofundiĝis en la studadon de Occidental-Interlingue kaj Interlingua (1960). La plej signifaj kontribuoj de C. al Occidental kaj Interlingua estas lia verko *Eo aŭ Interlingua* (eldonita sub la pseŭdonimo Edo Bernasconi) kaj liaj tradukoj de *Le familia del antiquario* kaj *Le alberatrice* de Carlo Goldoni. Havante ankaŭ konojn en Volapük kaj en aliaj malpli konataj planlingvoj, C. restis tamen praktika interlingvisto en pli ĝenerala senco. Liaj idisteco kaj e-isteco ne malhelpis lin engaĝiĝi por ambaŭ movadoj, en la Ido-movado ekzemple kiel vicprezidanto de SULI, redaktanto de *Suisa Ido-Buletino*, kiel kontribuanto al *Progreso*, sed ankaŭ kiel organizanto de idistaj kunvenoj aŭ kiel verkanto de komparaj Ido-studoj kaj kiel faka preleganto.

Ankaŭ por la Eo-movado C. aktivis multfacete ekde 1960. Kiel junulo li partoprenis la agadon de EJS kaj de la ĵus fondita Tiĉina Eo-Ligo (TEL, 1961), kies prezidanto li fariĝis en 1980 (en 1992 li lanĉis ĝian neregulan organon *Esperanto TI*). Kiam CDELI estis starigita en la 1950-60aj jaroj, li ekprezidis ĝian konsultan komitaton kaj organizis interlingvistikajn simpoziojn. En la kultura komisiono de KCE li estis eldon-komisiito de la kolekto *Studoj* de KCE, krome li estis vicprezidanto de IFA kaj membro de la fonduma konsilio de GEP. Kiel regiona vicprezidanto de SES por itallingva Svislando (de 1986) kaj iama UEA-delegito li organizis la regionajn Eo-renkontiĝojn en Tiĉino. C. kunlaboris kun multaj tiĉinaj kaj svisaj e-istoj, ankaŭ kun Kooperativo de →Literatura Foiro, kaj li aliĝis al AIS kiel ties ISK-ano (1983).

Apud la movadaj honoroficoj elstaras lia longtempa kaj diligenta verka kaj redakta kontribuado. Liaj multnombraj fakaj artikoloj estis presitaj en diversaj signifaj Eo-periodaĵoj (*Esperanto*, *Monato*, *Planlingvistiko*, *Literatura Foiro*, *Monata Cirkulero*, *Svisa Esperanto-Revuo*, *Language Problems and Language Planning*), sed ankaŭ en nacilingvaj gazetoj ĉefe itallingvaj/tiĉinaj. Pluraj Eo-

verkaĵoj aperis en lia propra mikro-eldonejo 'Hans Dubois', kiu ekde 1990 publikigas librojn en Eo kaj en aliaj lingvoj (→Bibliografio). Unu el la verkaj kulminoj de C. estas lia kunaŭtoreco de la signifa monografio *Esperanto en perspektivo* (UEA 1974), en kiu C. prilaboris la ĉapitrojn pri la kulturo kaj literaturo de Eo. En 1979 li redaktis la libron *Planlingva enketo* (Alsbach), en kiu li mem publikigis kelkajn signifajn artikolojn. En 1982 li kunlanĉis la revuon *Planlingvistiko* kaj verkis la enkondukon al la itala eldono de *Edmond Privat. Avventure di un pioniere* (en traduko de Dante Bertolini, Locarno 1983). En 1997 C. retiriĝis grandparte de siaj funkcioj en la Eo-movado, ĉefe pro profesia trookupiteco, sed ankaŭ pro kreskantaj duboj rilate la evoluon de Eo. Post kiam en 1998 aperis en la periodaĵo *Babylonia* lia sociologia enketo pri la svisa Eo-parolantaro, en konkluda studo titolita *Ĉu Eo postvivos la jaron 2045* (Bellinzona 1/1999, 2/2000) C. celis klarigi la kaŭzojn de la iom postiomia ŝrumpo de Eo en okcidenta Eŭropo kaj de la signifo de la disvastiĝo de la angla lingvo internacie kaj en Svislando. Sian lojalecon al Eo C., kiu hodiaŭ estas ĉie akceptata kaj respektata kiel ĝenerale praktikanta interlingvisto, pruvis per la kunlaboro kun la redakcio de *La Nova Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto* (Paris 2002), kies redaktantojn li konsilis rilate la fakterminaron pri psikiatrio.

Ankaŭ kelkaj familianoj de C., precipe lia edzino *Teresita Carlevaro-Bozzetta* (\*1948), iom partoprenis la Eo-aktivecojn.

→Ido en Svislando →Interlingua en Svislando  
→Tiĉino →Bibliografio →Antologio



Tazio kaj Teresita Carlevaro-Bozzetta

## **CENTRO DE DOKUMENTADO KAJ ESPLORO PRI LA LINGVO INTER- NACIA (CDELI)**

### **La Chaux-de-Fonds**

*Franclingve: Centre de documentation et d'étude  
sur la langue internationale (CDELI)*

C. estas la plej granda biblioteka kaj arkiva instalaĵo de la planlingva kaj Eo-movado en Svislando kun internacia signifo. Al la ĉefaj celoj de C. kiel fako de la urba biblioteko en La Chaux-de-Fonds/NE apartenas la serĉado, kolektado, konservado, katalogado, klasifikado de libroj, broŝuroj, periodaĵoj kaj aliaj dokumentoj presataj aŭ manuskriptaj rilate al planlingvoj kaj, nature, la studado de la planlingvoj mem. Intertempe C. evoluis al unu el la plej riĉaj kaj valoraj kolektejoj de libroj kaj dokumentoj en Eo kaj aliaj planlingvoj en la mondo. Krom pri Eo ankaŭ kaj precipe rilate al Ido (ekz. *Progreso*), Occidental (ekz. *Cosmoglotta*) kaj Interlingua (ekz. *Currero International* kaj *Revista de Interlingua*) la kolektado de C. estas tre ampleksaj, parte eĉ kompletaj dank' al malavaraĵoj, pertestamentaj donacoj de planlingvaj pioniroj, al interkonsentoj kun asocioj de tiuj planlingvoj, kiuj en siaj 'glo-raj' tempoj kunlaboris kun C., aŭ dank' al alispeca havigo de materialoj.



**BIBLIOTHÈQUE  
DE LA VILLE  
La Chaux-de-Fonds**

C. estas menciita en la renoma *Dictionnaire des langues imaginaires* de Paolo Albani & Berlinghiero Buonarotti (Paris, Les Belles Lettres 2001) kaj en aliaj gravaj eldonaĵoj lingvistikaj. Ankaŭ la nova eldono de *Plena Ilustrita Vortaro* (2002) enhavas la frapvorton C. La kvara volumo de *Dictionnaire historique de la Suisse* menciis, ke la urba biblioteko de La Chaux-de-Fonds estas (inter aliaj

gravaj konsultejoj kun Eo-bibliotekoj kiel en Vieno, Kortrijk, Aalen, Lublin, Londono kaj Roterdamo) elstara specialista adreso pri planlingvoj. Tiuj mencioj signifas sendube rekonon de C. ankaŭ fare de gravaj referencaj verkoj.

*Bazo de la kolektado, sav-agadoj, oficialigo de la laboro de C.:* La ideo pri la starigo de C. fontas en la 1950aj jaroj, fakte en 1954, kiam Mathilde Wolf kaj René Zollinger, anoj de la ĉaŭdefona EG, konfidis sian libraron al →*Claude Gacond* (\*1931), la arkivisto de C. Fernand Donzé (\*1923), tiama direktoro de la urba biblioteko, konsentis disponigi provizoran ejon por tiuj libroj kadre de la biblioteko, kondiĉe ke Gacond zorgu pri tiuj libroj en kunlaboro kun la bibliotekistoj. En 1961 estis eklaboritaj, kun Donzé, la celaro de la Eo-biblioteko kiel bazo por la statuto de C. La risko de malapero aŭ detruo de privataj planlingvaj aŭ esperantaj bibliotekoj, kiel en la kazoj de →Jules Gilliard en La Neuveville/BE kaj de →Edmond Privat en Neuchâtel, ambaŭ forpasintaj en 1962, fortigis la deziron de Gacond starigi arkivejon, kie povas esti deponitaj kaj konservataj la planlingvaj dokumentaroj, kiuj flanke de iliaj posedantoj aŭ de ties parencoj ne plu estas bezonataj aŭ riskas esti forĵetitaj kaj detruitaj pro malintereso aŭ indiferenteco pri tiuj materialoj. Tiel povis esti savitaj la privataj bibliotekoj de diversaj e-istoj, kiuj ekformis la fundamenton de C. Post la morto de →Hans Jakob povis esti entreprenita drasta sav-agado koncerne la privatajn arkivaĵojn de la iama direktoro de UEA en Ĝenevo (→Bibliotekoj).



Fernand Donzé, Claude Gacond kaj István Szerdahelyi

La postlasaĵoj de →Edmond Privat mem (i.a. korespondaĵoj kun Zamenhof, Gandhi, Roland) povis esti savitaj kadre de aparte kreita *Fondaĵo Edmond Privat* sine de la urba biblioteko de La Chaux-de-Fonds. Ekde septembro 1964 ĉi tiun fondaĵon prizorgis Pierre Hirsch (1913-96). Al la komitato de tiu fondaĵo apartenis André Sandoz (prezidanto), Claude Gacond (vic-prezidanto), Fernand Donzé, Yvonne Privat, André Tissot, John Nussbaum kaj →Eric Descoedres.

En aŭtuno 1967, pli precize la 2an de oktobro, la statuto de C. estis subskribita far Donzé kaj Gacond. Prezidanto de la laŭstatute trimembra Konsulta Komitato de C. fariĝis →*Tazio Carlevaro* (\*1945). La intenco de C. ne estis konkurenci analogajn instituciojn kun similaj celoj (ekz. IEM en Vieno kiel parto de la Aŭstra Nacia Biblioteko aŭ CED de UEA), sed krei kolektojn komplementan al tiuj instalaĵoj kaj flegi la kontakton kun ili. Komence SES, al kiu C. celis servi kiel dokumenta centro, kritikis la planlingvan neŭtralecon de C.

La kolektoj de C. povis kreski iom post iom pere de konvencioj kaj kontraktoj pri donacado aŭ interŝanĝo kun diversaj organizaĵoj kiel SES, EES, EG de La Chaux-de-Fonds kaj Ĝenevo kaj kun pluraj individuoj. Inter la fruaj donacintoj de siaj bibliotekoj al C. devas estis menciitaj, krom la supre notitaj personoj, ankaŭ la ĝeneva e-isto Paul Bouvier, la Ido-pioniro Edouard Watercotte (F-Colmar), →Philippe-André Schild (Basel) kaj Ferdinand Haller (Reinach/AG), kiuj estis adeptoj de Interlingua/IALA. En 1973 estis alportitaj la arkivoj de Henri Meier-Heucké en Luksemburgo, en kiu troviĝas la preskaŭ kompleta korespondado (1897-1913) inter Louis Couturat kaj Bertrand Russell. En 1975 estis rikoltitaj multaj novaj libroj el la bibliotekoj de ges-roj Jayet en Morges, →Hans Cornioley en Berno, →Hans Hunkeler en Aarau, Heinrich Lauber en Lucerno, →Hans-Joachim Unger en Zuriko, Rosa Buscato en Barcelono, Paul Mitrovich en Sarajevo k.a. En 1976 aldoniĝis la bibliotekoj de →Edouard Waldvogel, aĉetiĝis volapükajoj el la kolekto de Johann Schmidt. Tiuj kolektoj pliriĉiĝis per la posedaĵoj de L. De Guesnet en Parizo, Henry Jacob de Britio, Clara Kreis-Schneeberger, filino de →Friedrich Schneeberger, Interlin-

gue-instituto, Sarlanda Eo-Ligo k.a. Inter la heredaĵoj troviĝas impona kvanto de leteroj de L.L. Zamenhof, L. Couturat kaj de svisaj Ido-pioniroj.



Claude Gacond kaj Alphonse Matejka en la unua ĉambro de CDELI

Dum la 1980aj estis donacitaj dokumentoj ankaŭ de François Garigue (Marseille) kaj Marcel Erbeta (Biel-Bienne), →Fred Lagnel de la movado Occidental, →David Buhlmann (Laŭzano), Lena Grütter-Häberli (St. Gallen), →Otto Walder (Romanshorn), →William Perrenoud (Montmollin), Karl-Heinz Mischler (Zuriko), laŭzana ES, Helmut Ruhrig (Freiburg/Brsg.), →Hans Bipp (Marly), Anna-Bertha Gerber (Liebefeld), Gertrud Weigelt (Spiegel b.B.), Willy Voirol (Biel-Bienne), Frieda Hiltbold (Corseaux), Johann-Jakob Sturzenegger (Zürich), k.m.a. Unua interŝanĝo de dokumentoj efektiviĝis kun la Hispana Eo-Muzeo (1980). En la 1990aj jaroj la japana eldonisto Itô Kanzi donacis sian valoran libron aperintan kadre de la serio *ludovikito*. Aliaj arkivaĵoj estis transdonitaj de →Flurin Maissen en Grizono, iama adepto

de Occidental. Ankaŭ Germain Pirlot (Belgio), Detlev Blanke (Berlino), →Claude Piron, →Olivier Tzaut kaj →Tazio Carlevaro interŝanĝis parton de siaj bibliotekoj aŭ entute fordonis sian dokumentaron. Pluraj havindaj arkivaĵoj estis deponitaj ankaŭ el la postlasaĵoj de →Henri Vatré, →Dante Bertolini, →Maurizio de Sassi (dokumentoj el la komunistaj kaj SAT-medioj) kaj la lucerna ES (el la katolika medio). En 2005 aldoniĝis kvar ampleksaj dokumentaroj (Arthur Baur, Madeleine Stakian, W.J.A. Manders, Alfred Gloor). La donacintoj estas listigitaj en la ĉiujara raporto de CDĒLI.

*Statistiko:* Fine de 1971 estis katalogitaj 956 volumoj. Fine de 1973 la nombro de katalogitaj unuoj atingis 3584; fine de 1976 la C-kolektoj kreskis al 4203 unuoj, en 1977 al 4800, en 1978 al 5953 kaj en 1979 al 7710 unuoj. Fine de 1987, dudek jarojn post la ekvalidiĝo de la statuto de C., la arkivo registris entute 13'346 bibliografiajn unuojn kaj 1701 titolojn de periodaĵoj. En 1997, 3398 novaj titoloj eniris la katalogon, en 1998 alvenis 810 kaj en 1999 499, kaj en la jaro 2000 estis registritaj 172 novaj unuoj en la katalogo. En 2004 en la interrete konsultebla elektronika katalogo RERO aperis entute 742 novaj registraĵoj el C., kaj komence de la jaro 2006 tie estis konsulteblaj jam pli ol 3200 registraĵoj.

*Brokanta servo:* Pro la multnombraj duoblaĵoj, precipe gazetoj, sed ankaŭ libroj, kiuj amasiĝis kun la fluo de la tempo, C. instalas brokantan servon por ebligi al interesataj esperantologoj, interlingvistoj kaj aliaj kolektemuloj aĉeti fakajn dokumentojn. Intertempe Ĉi tiu servo estas vigle uzata de pluraj klientoj el diversaj landoj, eĉ el Japanio kaj Usono.

*Kunlaborintoj/-antoj:* En januaro 1965 povis esti komencata la organizita laboro en formo de la katalogado de la libroj. La kunlaborantoj de tiu periodo nomiĝis Suzanne Boichat (ĝis 1976), Hélène Berger, Mathilde Luthi, Andrée Gacond (la edzino de Claude Gacond) kaj Pierre-Yves Tissot, kiu poste fariĝis direktoro de la biblioteko de Le Locle.

Kiel Claude Gacond memoras, por li mem →André Schild (1910-81) el Basel kaj →Alphonse Matejka (1902-99) el La Chaux-de-Fonds fariĝis agrablaj kolegoj, kun kiuj li ŝatis kunlabori kaj kun kiuj li povis diskuti pri

ĉio objekte. Oni respektis unu la alian, kvankam oni ne apartenis al la samaj planlingvaj tendencoj. Schild kaj Matejka rakontis al Gacond multe pri la problemoj en la diversaj planlingvaj movadoj; kiel Gacond mem bedaŭras, la diskutoj ne estis registritaj, nek protokolitaj (kelkaj legindaj epizodoj tamen estas troveblaj en *Cosmoglotta*).



Vizito de Pierre Hirsch (dekstre)




Hélène Berger

En la komenca periodo de C. iom kunlaboris ankaŭ Reinhard Haupenthal el Sarlando, poste ankaŭ →Giorgio Silber kaj →Perla Mar-



tinelli, tiama sekretariino de KCE. En la 1980aj jaroj pluraj libervolaj helpantoj zorgis pri la ordigado kaj katalogado. Post la morto de Cosette Sandoz-Giroud en aŭgusto 2001, kiu fidele helpis libervole la katalogadon en C., konsentis kunlabori honorofice Nancy Fontannaz (\*1943) el Pully/VD, dum la bibliotekistino Martine Schneller (\*1945) post sia reveno de Francio al Svislando povis esti dungita por partatempe labori en C. ekde januaro 2002. Dank' al tiu salajrita posteno pli kaj pli da titoloj el C. povas esti registritaj kaj estas publike konsulteblaj ankaŭ tra la interreta kataloga projekto RERO.



*Ejoj de C.:* Ĝis la jaro 2004 C. translokiĝis kvin fojojn ene de la urba biblioteko. Unue ĝi okupis subtegmentan ĉambron (vd. la foton kun Alphonse Matejka sur skalo). Due C. migris al la subtera etaĝo. Trie, okaze de la unua granda transformado de la biblioteko, C. ricevis belan salonon en la dua etaĝo. Tiam ekestis la grandaj portretoj sur paneloj. En tiu

periodo C. ekricevis la movŝrankojn en la subteretaĝo.



Claude Gacond en CDELI

Kvare, en julio 1993 C. translokiĝis al la subtera salono de la apuda lernejo Numa-Droz. En tiu salono C. ricevis sian unuan retligitan komputilon, kaj tie estis komencita la RERO-katalogado.

Por la kvina fojo C., ĝuante la daŭran subte- non de la biblioteka direktoro *Jean-Jacques Humair*, ricevis, en aŭgusto 2004, en la dua etaĝo de la sama lernejo pli grandan salonon kaj rajtas uzi aliajn salonojn kiel kursejojn kaj studejojn.



*Sciencaj kaj aliaj aranĝoj:* En 1989 kolokvo inaŭguris ekspozicion dediĉitan al la centjara datreveno de la naskiĝo de →Edmond Privat. En aprilo 1994 okazis en C. la unua interlingvistika simpozio, kaj dua analoga aranĝo, iniciatita de Tazio Carlevaro, ripetiĝis en novembro 1996. En aŭgusto 1998 disvolviĝis, gastigita de C., la unua forumo de la →Esperanta Civito. Kadre de C. estas daŭrigata ankaŭ la tradicio de la didaktikaj kursoj por progresintaj e-istoj.

En 2004 C. kunlaboris en la preparado de kvar ekspozicioj (pri →Charles Baudouin en Carouge/GE, pri Eo en Vevey/VD, en la duagrada lernejo en Le Locle/NE kaj en Les Brenets/LE lige kun la inaŭguro de tabulo honore al →Edouard Ducommun).

*Eksteraj rilatoj (vizitantoj kaj sciencaj esplorantoj):* Jam en 1971-72 C. estis vizitata de entute 167 personoj el 12 landoj. En 1975 ekestis rilatoj kun la universitato Eötvös Loránd en Budapeŝto, kies interlingvistaj reprezentantoj d-ro István Syerdahelyi kaj d-ino Ilona Koutny ripete vizitadis La Chaux-de-Fonds por instrui en KCE/IFA. Ĉi tiuj rilatoj estis daŭrigitaj kun Zsuzsa Varga-Haszonics, direktorino de la Eo-sekcio de la fakultato pri aplikata lingvistiko de la Teknika Universitato Eötvös Loránd en Budapeŝto. En 1976 viziton al C. faris i.a. Victor Lebrun, iama sekretario de la rusa verkisto Leo Tolstoj, kiu pozitive pritaksis la zamenhofan aferon.

Okaze de la 64a UK en Lucerno en 1979 Humphrey Tonkin, tiama prezidanto de UEA, veturis al La Chaux-de-Fonds por diskuti la reciprokajn rilatojn inter C. kaj UEA. En tiu ĉi jaro C. povis disponigi grandparte la materialon por la ekspozicio 'Eo kaj Interling-

vistiko en Svislando', kiu estis aranĝita en la Svisa Nacia Biblioteko en Berno kaj en la centra biblioteko de Lucerno.



Claude Gacond en CDELI (fotis Cosette Sandoz en 1995)

Inter aliaj scienco- kaj rilat-celaj vizitantoj troveblis krom multaj svisoj ankaŭ Walter Ŝelazny, Ryszard Rokicki, Tomasz Chmielik, Zbigniew Galor (Pollando), Stefano Keller (Hungario), Renée Brinon kaj Henri Coulon (Francio), Anita Altherr-Masé (Triesto/ Ĝenevo) k.a., tiel ke la publiko fariĝis pli internacia. Aliaj menciindaj vizitantoj nomiĝas Lee Chong-Yeong, prezidinto de UEA el Suda Koreio, Renato Corsetti, prezidanto de UEA, Stano Marček (Slovakio), redaktinto de *HdEo* kaj redaktoro de *Esperanto* (UEA), Patrick Sériot, profesoro pri rusa lingvistiko en la laŭzana universitato, kiu okazigis konferenceton por siaj studentoj pri artefaritaj lingvoj en la urba biblioteko de La Chaux-de-Fonds. El Usono alvenis la esperantologoj Richard Wood kaj Duncan Charters. En 2004 C. ricevis la viziton de la e-isto Benoît Philippe, kiu venis el Dresdeno kun deko da lernantoj. Monika Molnár (Hungario) iom kunlaboras kun C. lige kun sia instrua aktiveco ĉe La Grande Ourse. En la tempo inter 1974 kaj 2004 do multcentoj da e-istoj kaj neesperantistoj el sesdeko da ŝtatoj vizitis la planlingvan arkivejon en La Chaux-de-Fonds. En 1973 Margaret Huber de la universitato de Ottawa (Kanado) venis al C. por konsulti la arkivojn por sia disertacia projekto pri la

temo 'Eo kiel premgrupo sine de la Ligo de Nacioj 1920-30'.



Martine Schneller en CDELI

Inter 1993 kaj 2003 Tomasz Chmielik el Świdnik/Lublin (Pollando), kiu antaŭ kelkaj jaroj tradukis la verkaron de Friedrich Dürrenmatt en Eon (→Literaturo, beletra), ordigis kaj eldonis kajerforme kaj sur KD-oj en sia privata eldonejo Libro-Mondo (Svidniko) ĉiujn franclingvajn artikolojn de →Edmond Privat, kiujn ĉi tiu aperigis de 1919 ĝis 1962 en la gazetoj *Le Droit du Peuple*, *La Sentinelle*, *Le Travail*, *La Coopération*, *Le Coopérateur genevois* kaj *L'Essor*. En 2003 li eldonis, kunlabore kun C., la unuan volumeton de la reeldonotaj manuskriptoj de Edmond Privat, *Tamen perdota*.

C. estis uzata de pluraj eksteraj esploristoj kiel ekzemple de Mahommad Farrokh, kiu verkis disertacion pri Edmond Privat (ĝeneva universitato, 1989). Ekde 1993 →Andreas Künzli (Lucerno), kiu utiligis C. jam por sia universitata diplomverko en la 80aj jaroj, pli sisteme traserĉadis la arkivojn de C. nun ankaŭ des pli lige kun *Svisa Enciklopedio*

*Planlingva*, kiu fariĝis oficiala projekto de C. kaj SES kadre de la Agado 2003.



Nancy Fontannaz kaj Claude Gacond

En 2001 estis prezentita grava verko, kiun pretigis Anne-Françoise Schmid de la Nacia Instituto de aplikataj sciencoj en Lyon (Francio). Temas pri *Bertrand Russel: correspondance sur la philosophie, la logique et la politique avec Louis Couturat (1897-1913)*, kiu aperis ĉe la pariza eldonejo Kimé. Ĉi tiu impona duvoluma verko 734-paĝa estis realigita en kunlaboro kun Tazio Carlevaro kaj surbaze de la ekspluatado de pli ol 400 leteroj konservataj en C. Mohsen Sakri de la universitato de Nancy (Francio) restadis ĉe C. en 2003 por trovi dokumentojn pri la rilatoj inter Henri Poincaré kaj Louis Couturat. Al ceteraj esplorcelaj vizitantoj de CDELI apartenis Sergej Kuznecov, la konata interlingvisto el Moskvo, kiu kompletigis sian dokumentaron pri René de Saussure, kaj Adolf Burkhardt el Germanio por rikolti aron da materialoj mankantaj en la interlingvistika biblioteko en Aalen. Inter la gimnaziaj aŭ universitataj studentoj, kiuj konsultis C., KCE aŭ Claude Gacond persone lige kun siaj sciencaj diplomverkoj aŭ disertaciaj projektoj, estas menciindaj Lilli Papaloïzos (bazela universitato, 1992), kiu skribis sian disertacion pri sociolingvistika temo lige kun la komunikada praktiko de KCE, Sébastien Moret (laŭzana universitato), kiu okupiĝis pri la historio de la Eo-movado en Sovetunio (li prelegis pri tiu temo kadre de la esperantologia konferenco en UK Vilno en 2005), kaj Emmanuelle Houlmann (friburga universitato, 2005), kiu

finverkis sian diplomlibron pri Edmond Privat kaj ties engaĝiĝo por la paco. En 2006 povis esti realigita la reeldono de *Interpopola Konduto* de Edmond Privat, en kunlaboro kun C. kaj du privataj mikro-eldonejoj en Pollando. (→Bibliografio)

→Bibliotekoj →Neuchâtel →Claude Gacond



Ekde 2004 CDELI troviĝas en la dua etaĝo de la meza turo (fotis A. Künzli en novembro 2005)

*Konsulta Komitato de CDELI:* Laŭ la jarraporto de CDELI de 2004 jenaj personoj estas listigitaj kiel membroj de la konsulta komitato: Mireille Grosjean-Robert, instruistino (Les Brenets), Jean-Thierry Von Büren, instruisto (Savagnier) kaj Nancy Fontannaz, emerita instruistino (Pully). Kiel konsilantoj oficas: Tazio Carlevaro (Bellinzona, interlingvistiko), Andreas Künzli (Berno, slavaj lingvoj), Claude Piron (Gland, rilatoj kun internaciaj organizaĵoj).



Vidaĵoj de la plej nova CDELI-salono (ekde 2004, fotis A. Künzli en novembro 2005)



### **Emma CHENEVARD**

1884-1939

Ĉirkaŭ la jaroj 1912-14 C. estis kasistino kaj 1917-18 provizora prezidantino de SES. En 1917 oni trovas ŝin (ĉe la adreso Villa Beau-Soleil, Neuchâtel) inter la aliĝintoj de Asotsio por fonetika alfabeto internatsia, kiu estas administrata de →René de Saussure. En 1919 la *Jarlibro* de UEA listigis ŝin kiel delegitinon en Neuchâtel. Poste ŝi aliĝis al la reformprojektoj de →René de Saussure, transprenante la taskon de sekretariino de la Akademio Esperantida (ĉ. 1924) kaj pli malfrue de la Nov-Esperanta Akademio (1932). Ŝi verkis lernolibron de la lingvo Esperantido (*Langue Internationale Espérantide en 4 semaines*, Neuchâtel 1920).

## **Albert DEBRUNNER**

1884-1958



Post la abiturienta ekzameno en 1902 D. studis grekan kaj latinan filologiojn en la universitatoj de Basel (naskiĝloko) kaj Göttingen kaj doktoriĝis en 1907 en Basel. Sekvis engaĝoj kiel gimnazia instruisto en la evangelia lernejo en Schiers/GR (1907-12), kiel instruisto en la evangelia prediklernejo en Basel (1912-15) kaj en la kantona gimnazio en Zürich (1915-18). En 1917 D. habilitiĝis pri hindeŭropa lingvistiko en Zürich. Post periodo kiel eksterordinara profesoro en la universitato de Greifswald (1918-20), en 1920 D. akceptis vokon kiel ordinara profesoro pri klasika filologio kaj lingvistiko en la berna universitato. En 1925 li reiris al Germanio kiel ordinara profesoro en la universitato de Jena, kie li restis ĝis 1935. Sub la premo de la nacisocialismo D. revenis al Bern, kie 1935-54 li daŭrigis labori kiel ordinara profesoro pri hindeŭropistiko kaj klasika filologio (aparte: greka kaj sanskrita). En 1924/25 kaj 1937/38 li estis dekanato, en 1951/52 rektoro de la berna universitato. En 1944 li fariĝis honordoktoro de la teologia fakultato de la bazela universitato, kie 1939-49 li instruis. En 1954 D. demisiis de siaj postenoj. D. estis edzo de Martha Ruedin, filino de konata bazela instruisto kaj kun ŝi havis kvin infanojn. D. mortis en Bern en 1958.

La scienca aktiveco de D. havis du ĉefajn fokusojn: unue la greka lingvo de la nova testamento kaj la sanskrita gramatiko. La dua fokuso estis ligita kun la verkado de la antikva hinda gramatiko fare de lia instruisto Jacob Wackernagel (1853-1938). La bibliografio de la verkaro de D. ampleksas pli ol 600 titoloj.

D. kunlaboris en diversaj sciencaj komisionoj, apartenis al pluraj fakaj societoj kaj partoprenis multajn konferencojn. Li estis la direktoro de *Indogermanisches Jahrbuch* kaj *Indogermanische Forschungen*, kie aperis lia kontribuo pri la rilatoj inter lingvoscienco kaj planlingvo (vol. 50/1932, vd. sube).

Kun Hugo Schuchardt, →Ferdinand de Saussure, Jan Baudouin de Courtenay, Edward Sapir, Antoine Meillet, Charles Bally, Henri Frey, Björn Collinder, Bruno Migliorini, Eugen Wüster, Otto Jespersen, →Otto Funke, Alf Sommerfelt, Serge Osip Karcevskij k.a., D. apartenis al la eminentaj lingvosciencistoj, kiuj varme interesiĝis pri la demando de la internacia planlingvo, konsiderante, ke tia lingvo principe estas dezirinda kaj ebla. Dum la konferenco de →IALA, okazinta de la 20a de marto ĝis la 2a de aprilo 1930 en Ĝenevo, D. klarigis la kialojn de sia interesiĝo pri la planlingvoj. Laŭ lia rakonto, kiel svisa civitano li ĉiam sentis sin iomete ankaŭ kiel monda civitano, rigardanta translimen, precipe se oni loĝas en Basel. Jam en siaj gimnaziaj kaj studjaroj lin altiris la atento pri la neŭtrala universala lingvo, ĉar en Basel eblis aŭskulti prelegojn pri la mondlingva problemoj kaj cetere ankaŭ pri la monda pacmovado, kiu laŭ D. formas iusence paralelon al la Eo-movado. En sia junaĝo D. havis iom skeptikan sintecon vidalvide de la planlingvaj protagonistoj, kiujn li konsideris iom realec-fremdaj, same kiel la anojn de la pacmovado. Ŝajnas, ke poste lia skeptiko iom malaperis, kiam li konstatis, ke tiuj movadoj fariĝis malpli ideologiecaj, celante pli praktikan agadon. Dum la nomita ĝeneva IALA-konferenco, kiun partoprenis i.a. ankaŭ Charles Bally, →Otto Funke, →René de Saussure, Petro Stojan k.a., kaj kiu estis protokolita de →William Perrenoud, D. esprimis la ĝojon, ke IALA serĉas la kunlaboron kun profesiaj sciencistoj-lingvistoj por la interlingvistikaj diskutoj kun la celo igi ilin pli raciaj kaj pontkonstruaj inter la reprezentantoj de diversaj planlingvaj sistemoj; krome li emfazis la gravecon utiligi jam elprovitajn lingvosciencajn metodojn cele al la evito kaj elimino de diletanteo en la interlingvistika laboro. Malgraŭ tiu bonvolo D. rifuzis aliĝi al konkreta planlingva sistemo. Tamen ne estis sekreto, ke D. havis grandan simpatian por la zamenhofa Eo, kiu impresis

lin pro ties konsekvenca reguleco. D. konsideris, ke decido koncerne la dezirindon kaj enkondukon de internacia planlingvo devus nun urĝe esti farita, ankaŭ sur la nivelo de la monda politiko, ĉar pli poste eble estos tro malfrue. En IALA D. prezidis ĝian Committee for Agreement (CfA de IALA), kiu alstrebis 'ekumenan' solvon inter la planlingvaj sistemoj kaj movadoj per lingva sintezo. Kiam D. sentis, ke la politiko de IALA evoluas en la direkto de la prefero de la naturalismo en planlingvistiko, li kaj Funke distancigis de tiuj tendencoj per deklaro aneksa al la protokolo de la ĝeneva IALA-konferenco. Sekve D. pli kaj pli estis suspektata pro kriptoesperantisteco, ĉefe fare de Edgar von Wahl, kreinto de Occidental-Interlingue, kaj de →Ric Berger, kiu ĝis 1956 estis adepto de Occidental-Interlingue kaj kiu en tiu jaro transiris al Interlingua. En 1946 D., kiu en Bern ofertis ankaŭ universitatajn kursojn kaj prelegojn pri la historio kaj la problemo de la neŭtralaj universalaj lingvoj (ekzemple en februaro 1938 pri la temo 'Novaj organizaj provoj sur la vojo al la ununura mondhelpingvo', notita en *Svisa Espero*), demisiis kiel prezidanto de CfA kaj rezignis pro troa laboro kaj alta aĝo.

En la ĉeesto de D. kaj de lia berna universitata kolego →Otto Funke la planlingva demando estis traktita ankaŭ dum la dua kaj sesa internaciaj lingvistaj kongresoj (Ĝenevo 1931 kaj Parizo 1948).

La plimulto de la postlasitaj priplanlingvaj dokumentoj de D. estas konservataj en →CDELI.  
→IALA

### **EO (lingvo, 1925)**

Efemera aposteriora planlingva projekto sur la bazo de Esperanto, prezentita de *Petro E. Stojan* (pseŭd. *O.D. Ribaulb*, 1884-1961) en Ĝenevo. La projekto ne estis publikigita.

Bibl.: O.D. Ribaulb: *Eo*. Genève 1925.

→Espo

### **ESPERANTIDO (lingvo, 1919)**

Unu el la multaj reformprojektoj sur la bazo de Eo, ellaborita de →*René de Saussure* (pseŭd. Antido, 1868-1943) kaj publikigita en

Bern/Neuchâtel (1919). Temas pri projekto, iom modifinta la antaŭajn sistemojn →Antido I/Antido II kaj →Lingvo Kosmopolita/Lingvo Kosmopolita ĉefe koncerne la ortografion, grafikon, vortfaradon kaj gramatikon. Diference de Ido E. konservis la Eo-korelativojn, anstataŭante la radikon *ĉi* per *omni*. Sekvis aliaj versioj de E. (1920, 1922, 1923).

Ŝanĝoj kompare kun Eo: *ĝ* anstataŭ *ĝ*, *ŝ* anstataŭ *ŝ*, *ĉ* anst. *ĉ*, *x* anst. *ks*, *n* anst. *j*, sen akuzativo, *preske*, *irge*, *omnitage*, *savi* anst. *scii*, *sienco* anst. *scienco* ktp.

**Specimena teksto:** Esperantido ne estas nova lingvo. ĝi enhavas en si la tuta tradicio Esperanta kaj preske la tuta vortaro Zamenhofa. Akceptante Esperantido, oni do ne riskas nova experimento. Irge ni libro, skribita en Esp-o, povas tuy esti transskribita en Esp-ido nuran gramatikan ĉanĝeton. Nu do esperas, ke omnin samideanon, kiun deziras atingi definitiva uneco de la lingvo internacia, ne rifuzos kunlabori kaj klopodi kun nu por atenti la Ligo de la Popolon (Societo de Nacion) pri la lingvo internacia. Vi certe savas, ke internacia lingvo newtrala yam existas dep 30 yaron kaj estas uzata kaj parolata omnitage de milon de homon.



N-ro 1 de la gazeto pri la lingvoprojekto Esperantido

Apud la aro de verkoj kun la celo popularigi la novan lingvon, kiun la aŭtoro nomis dialekto de Eo, aperis la monata gazeto *Esperantido* (Berno). Tiun periodaĵon 1919-24 anstataŭis *Lingvo Internacia Esperantida*, monata gazeto por la Ligo de la Popolon kaj la Progreso Homara kaj „oficiala organo” de la *Esperantida Akademio* (red. de de Saussure). Krom tio, laŭ informo de E.K. Drezen, formiĝis grupetoj de esperantidistoj, kreiĝis himno esperantida (*L'espero*), fondiĝis *Universala Unio Esperantidista* kaj eĉ *Tutmonda Esperantidista Katolika Unio*. Lige kun lia interesiĝo pri la demando de la organizado kaj kunordigado de la internaciaj asocioj pere de

tegmenta organizaĵo aperis en E. la broŝuro *Univo de la Internacian Asocion* (Bern 1920). En tiu periodo de Saussure kunlaboris kun →Emma Chenevard, iama e-istino, funkciinta en 1917 kiel provizora prezidantino de SES.  
 Bibl.: [R. de Saussure] Antido: *Fundamento de la lingvo «Esperantido», nova formo de la lingvo internacia Esperanto. Revizita kaj aprobata de la Esperantida Akademio*. Bern 1919.  
 →René de Saussure →Bibliografio

### **ESPERANTIDO (lingvo, 1920)**

Ŝanĝoj kompare kun Eo: *j* anstataŭ *ĝ*, *q* anst. *k* (*qelka*), *grandivis* anst. *grandiĝis*, diversaj novaj vortoj.

*Specimena teksto*: La lingvo vekis varmegan entuziasmon, kar en ĵi vivis la nobla animo k. alta idealo de ĵia aŭtoro; la anaro pli k. pli grandivis. Esperanto, uzata skribe k. parole, progresis deŭ proxor 15 yaron, kiam qelkan anon ekdeziris reformi ĵi. Ŝaynis al lu, ke endas naw simpligi, ulsor reguligi kaj precizigi la lingvo. Lu examenis omnin, slo lu, farendan modifon, kay, kar ne ibla estis endukti lu en Esperanto, lu pretigis kompleta projekto de nova lingvo.

Bibl.: [R. de Saussure]: *Petit vocabulaire de la langue internationale 'Esperantide'*. 1ère partie: *Vocabulaire international-français*. 2ème partie: *Vocabulaire français-international*. Bern 1920.

### **ESPERANTIDO (dialekto de Esperanto, de Antido, 1922)**

Ŝanĝoj kompare kun Eo: *-u* anstataŭ *-on*, *-un* anst. *-ojn*, *-an* anst. *-aj*.

*Specimena teksto*: I vidvino havis du filinun. La pli aja estis tiele simila al la patrino per sia karaktero k. vizajo, ke omniolo, kia ŝu vidis, povis pensi ke li vidas la patrinu. Ili ambay estis tiele malagrablan k. tiele fieran ...

Kite ti ci bela knabino venis domeŭ, ŝia patrino insultis ŝu, pro kio ŝi rukvenis tiele tarde deŭ la fonto. „Pardonoy al mi, patrino“, diris la malfortuna knabino, „ke mi restis tiele longe.“ ... „Estus tre bela“, respondis la filino malĵentile, „ke mi iroy al la fonto!“ „Mi volas, ke vi tibeŭ iroy“, diris la patrino, „kay iroy vi tuy!“

Bibl.: [R. de Saussure]: *Fundamento (trilingva) de la lingvo Esperantida (dialekto de esperanto)*. Neuchâtel 1922.

→René de Saussure →Bibliografio

### **ESPERANTIDO (da Antido, 1923)**

Ŝanĝoj kompare kun Eo: finaĵoj kiel Esperantido 1924 (*diakritan konsonanton* anstataŭ *diakritajn konsonantojn*), *ch* anst. *ŝ*, *reform-* anst. *reform-*, *biti* anst. *peti*, *kom* anst. *kiel* ktp.

*Specimena teksto*: Existas ya diversan alian reformprojekton de Esperanto, sed el omnin tin projekton la Esperantida estas la sola, ki konservis netuchitan la strukturu k. flexeblu de la Zamenhofa lingvo. La celo de la aŭtoro estis forigi el Esperanto kelkan extran defektun jenantan, exemple la diakritan konsonanton kay la troy oftan finayun. Ti celu li atingis tre simple per nura interĉanjo de la tri esperantan finayon u, n, oy; seĝe, irgam i esperantisto povas lerni la Esperantida dialektu en kelkan horon. Omni vorto or lingva esprimo, ki trovivas en la Fundamenta Krestomatia, estas konsiderenda kam oficiala vorto or esprimo, kay omnin Esperantidon estas bitatan konsideri la Antida Krestomatia kom la sole fidinda modelu lingva. Kite ti ciy bela knabino venis domew, ŝia patrino insultis ŝu, pro kio ŝi rukvenis tiele tarde deŭ la fonto.

Bibl.: R. de Saussure [ANTIDO]: *Fundamenta Krestomatia de la internacia lingvo "Esperantida"*. Kun gramatika k. exercaro. Bern 1923.

→René de Saussure →Bibliografio

### **ESPERANTO II (lingvo, 1937)**

Temas evidente pri la plej lasta konata reformprojekto evoluigita de →René de Saussure (1868-1943) kaj publikigita en Bern (1937), post longa serio de projektoj komentitaj en 1907, kiujn li ellaboris kun la celo plibonigi Eon. En la kazo de E. esence temas pri sistemo kongrua kun →Nov-Eo/Mondialo kaj →Universal-Eo. Ĝi povas esti konsiderata kiel kulmino kaj konkludo de la reformaj klopodoj de de Saussure. Laŭ Monnerot-Dumaine (1960), E. estas „memstara“ sistemo. Ŝanĝoj kompare kun Eo: esence la samaj ecoj en la morfologio kiel en antaŭaj projektoj.

*Specimena teksto*: Vizitinte perhazarde la 2-a Universala Kongreso de Esperanto be Genevo (te 1906), mi farevis Esperantisto ey partoprenis tie la fondu de la Int(ernacia) Scienca Asocio Esperantista, kaes mi estis elektata sekretaro. Dum pli longe ki qin yaron mi anke estis chef-redaktoro de la Int(ernacia) Scienca Revuo, la oficiala organo de ta Asocio, kay tiam havis pliente ki 800 membrun. En 1907

okazis la 3-a Universala Kongreso de Esperanto be Cambridge, kaw mi anke beestis ey kie mia projekto de internacia helpmono estis akceptata di la Kongreso. Pos ta Kongreso aperis la riformprojekto Ido, verkita di Markezo de Beaufront ey Prof. Couturat. Mi tuy konsiis, ke ta projekto estas tute ne konforma al la spirito de Esperanto, kaes rimarkinda flexeblu Ido detruis per logika derivsistemo tro rigida por la chataga uzado de la lingvo skribe ey parole, ey dey ta tago mi komencis rifuti la pretendun de Ido en la Int(ernacia) Scienca Revuo. Dum mia laboro por la riformo de Esperanto mi examenis ne nur la projektu Ido, sed anke la interlingvun el la skolo „naturista“ (Occidental, Latino sine flexione, etp.), Tala lingvoprojekton estas interesa, sed lina awtoron forgesis, ke la ple malfacila parto de la interlingva problemo ne estas la facila kompreno por la Okcidentanon, sed la facila parolado por cha popolon de la terglobo. Ey lo ankore pli malfacila ne estas krei interlingvu, sed ju vivigi, ey tu sukcesis nur Esperanto; forlasi la bazu Esperanta ey la grandega laboru yam farita di la Esperantiston estus vera frenezajo, tiente pli ke la Esperantiston niam akceptos lingvu tute nova.



Revuo pri Esperanto-II

Bibl.: R. de Saussure [ANTIDO]: *Oficiala fundamento de la Akademio por la interlingvo Esperanto II-a, or Esperanto renovigita konforme al la postulon de la moderna vivo, okaze de la 50-yara jubileo de Esperanto, 1887-1937*. Bern 1937 (2a eld.).

- Antido I / Antido II
- Lingvo Kosmopolita / Lingvo Cosmopolita
- Esperantido
- Nov-Esperanto/Mondialo
- Universal-Esperanto
- René de Saussure → Bibliografio

### ESPIDO (lingvo, 1923)

Efemera aposteriora planlingvo, sintezo de Eo kaj Ido, ellaborita de la franca idisto → *Marcel Pesch* (pseŭd. Marcelo Persiko, Defirs, 1893-1970) kaj publikigita en Ĝenevo (1923). Fine de sia vivo Pesch rifuzis sian

aŭtorecon de la projekto, ĉe kiu la idismoj superpezas.

*Specimena teksto*: Unesma vide semblas, ke la vivo-cirkonstancoj di la Primitivo esas deskriptebaj maxim bone per serio de nego frazaj. Praktikale, lua nutrivo-listo inkluzas nur la manyeblojn obteneblajn sen preliminara laboro: la fruktojn de la forestoj, e la fishojn de la riveroj e de la bajoj.

Bibl.: [M. Pesch] Defirs: *Espido, mixuro ek Esperanto ed Ido*. En : Kosmoglott 1923.

### ESPO (lingvo, 1926)

Efemera aposteriora planlingva projekto sur la samaj gramatikaj kaj vortfaraj principoj kiel en Eo, prezentita de *Petro E. Stojan* (pseŭd. O.D. Ribaulb, 1884-1961) en Ĝenevo. La projekto ne estis publikigita. Per siaj diversaj planlingvaj eksperimentetoj Stojan celis kontribui al la solvo de la demando de la fonetika kaj gramatika ekonomio kaj de la mallongeco de la vortradikoj kaj formoj. Sub la nomoj *Eo, Liana, Unita, Renova, Amiana, Aryana* ktp. estas konataj aliaj reformprovoj de Stojan.

Bibl.: O.D. Ribaulb: *Espo & Eo*. Genève 1926.

→ EO

### EUROPANTO (lingvo)

Speco de internacia lingvo proponita de *Diego Marani* (\*1959), itala verkisto kaj tradukisto en la ĝenerala sekretariejo de la Konsilio de Ministroj de Eŭropa Unio en Bruselo. Dum la periodo 1999-2001 regule aperis en la ĝeneva gazeto *Le Temps* rubriko verkita en tiu lingvaĵo. En intervjuo aperinta en *L'Impartial* (26.8.2002) la aŭtoro klarigis pri E. jenon: „E. ne estas lingvo, multe pli kodo lingvistika, kiu devus esti komprenebla al ĉiuj europanoj. Ĝi devas permesi provoki la intereson de ĉiu por la lingvo de la aliulo.” Ŝajnas, ke Marani ege amuziĝis verkante siajn tekstojn en E., kiu havas nur du regulojn: la unua regulo estas, ke ĝi ne havas regulojn, due E. estas korekta, kiam la interparolantoj sin reciproke komprenas. Tamen li ŝuldas la respondon, ĉu do temas pri nova universala lingvo aŭ nur pri karikaturo de ĝia ideo por absurdigi la lingvan konfuzon regantan en Eŭropo, respektive en la Eŭropa Unio.



Jen teksta specimeno publikigita la 27an de majo 1999:

Der novo trend des moderne economie esse der totale fusione. Auto fabricas, telefoniche societates, multinacionales bankas, alles unite por beste profit. Novas gigantische firmas esse geborn in eine postmeridio. Renault fusionne mit Volvo und shal presto produce titanische camiones des name van Renolvo und miniature city autos des name van Voltvaut. Ohne dinero italiane bankas als Credito Italiano fusionne alles seine debts por make eine gigantische banquerupte banka des name van Debito Italiano. Aber als por jedere matrimoniale union, tambien por fusion algunas times solo eine partner make profit und de andere mucho lose, maxime regretante der decision des fusion. Primeramente porqué nicht alles can man ensemble fusionne. In economie als in gastronomie, tu can fusionne wat eine affinitas habe. Zum exemplo, tu can fusionne kaffee mit milk oder witte wine mit kirr, oder tonic mit wasser. Aber no can fusionne martini mit olive olie oder ciffammoniacal mit sabaione. Op de zelfe maniera, no can fusione firmas qui belong aan tropo diferentes culturas, aan profundemente diverse conceptiones van humane life. Zum exemplo, die germanische patrones des Deutsche Telekom habe nicht unterstuddo que ellos shal eine totale failure face quando acquirente de italiane Telecom. Porqué por germanicos der telefono esse eine werk instrumento zum utilize mit practicale functionale efficienza und parsimoniose achtung por not excessive dispend van dinero. Por italianos, op el contrary, der telefono esse eine conviviale gadgettose medio, por chat mit mamma oder flirte languidamente mit femminile amigas, oder distractemente discusse die calcio results, tifose insistente over seine squadra reasons por penalty obtain.

Der result van diese culturale discordia shal esse que die germanicos shal bezale muchos deutschemarcos in expensive satellites zum verkauffe mobilfonos por business hombres qui shal siempre der line engaged finde, maxime jammed por cause des italiane peripatetische balneare blabla.

### **FITUSA (lingvo, 1935)**

Efemera apriorema planlingva projekto ellaborita de *B. (Barney) Rosenblum* kaj publikigita en Basel (1935). Kelkaj trajtoj de la sistemo estas:

La alfabeto konsistas el 11 literoj: *a, i, o, u; p, f, k, l, s, t, m*. La koncernaj komencaj literoj indikas la ciferojn ĝis 10 kaj 0;

Substantivo singulara: *-o*;

Adjektivo: *-a*;

Pronomoj: *mo, to, so; mi, ti, si*;

Infinitivo: *-i*; is-tempo: *-iti*; as-tempo: *-i, os-tempo: -usi*;

Prepozicioj: *ap, af, ak, al, as, at, am*;

Konjunkcioj: *po, om, ot, os, um*.

La vortfaradon eblas ilustru ekzemple per la nomoj de la monatoj: *paito* (januaro), *faito* (februaro), *kaito* (marto) ktp.

*Specimena teksto*: aki soma sako osi mu A palo maso om loka palos maso.

Poste menciigis de la sama aŭtoro iu lingvoprojekto Soma, sed detaloj ne estas konataj.

Bibl: B. Rosenblum: *Fitusa. Die Geburt einer Sprache*. Basel 1935.

→Soma

### **Otto FUNKE**

1885-1973



F. naskiĝis en Salzburg en la tiama habsburga monarkio kaj studis 1903-9 en la munkena kaj viena universitatoj, en 1908 li doktoriĝis en Munkeno. Antaŭ la unua mondmilito, kiam li servis en la aŭstra armeo, li estis instruisto en Salzburg. En 1920-26 F. instruis la anglan lingvon en la germana universitato en Prago, en 1926 li estis vokita kiel profesoro pri anglaj lingvo kaj literaturo en la berna universitato (ĝis 1956). Kiel anglisto de la skolo de →Ferdinand de Saussure kaj Anton Marty (1847-1914), kies verkadon F. komentis kaj editoris, F. multe laboris kaj publikigis sur la kampo de la historio de la anglaj gra-

matiko, lingvo, literaturo, filozofio kaj de la kultur-historio kaj literatur-kritiko (anglistiko). Dum la dua mondmilito li faris grandan servon al la svisaj studentoj pri angla lingvo, kiam ekmankis instruiloj por tiu lingvo, mem verkante tekstojn pri siaj fakoj. Liaj malgrandaj legolibroj *An Old English Reader* (Bern 1943) kaj *Middle English Reader* (Bern 1944) estis longe uzataj.

En 1932 F. edziĝis al bernanino kaj fariĝis svisa civitano. Li mortis en Bern en 1973.

Laŭ propra eldiro F. ekinteresiĝis pri la universalaj neŭtralaj lingvoj kiam li estis aŭstra oficiro en Orienta Eŭropo dum la unua mondmilito, spertante la internacian lingvo-problemon en la danuba monarkio kaj en Siberio. Sekve li komencis dediĉi sin al la studado de tiu temo. Lia plej signifaj verko, kiu rilatas al la historio de la universala lingvo, portis la titolon *Das Weltsprachenproblem in England im 17. Jahrhundert* (kaj aperis en *Anglistische Forschungen*, 69, Heidelberg 1929); en ĉi tiu studo F. esploris la planlingvajn ideojn de la angloj George Dalgarno, John Wilkins kaj Francis Bacon. En 1930 F. partoprenis kun sia kolego →Albert Debrunner la konferencon de →IALA en Ĝenevo; en 1931 li ĉeestis ankaŭ la 2an internacian lingvistan kongreson samurbe, kie la planlingva temo estis traktita. Laŭ F. la lingvosciencistoj komencis okupiĝi tro malfrue pri la internacilingva demando, kion li bedaŭris. Opiniante, ke la apero de ĉiam novaj proponoj de planlingvaj sistemoj ĝenas la tutan entreprenon, li alvokis trovi seeble unuecan lingvoformon, kiu servu kiel bazo por la plua evoluado. Kiel liaj hindeŭropistaj kolegoj →Albert Debrunner kaj →Eduard Schwyzer ankaŭ F. ne aliĝis al unu el la sistemoj, kvankam li simpatie rilatis precipe al la zamenhofa Eo.

→IALA

### **IALA - International Auxiliary Language Association in the United States**

La celo kaj la taskoj de *International Auxiliary Language Association in the United States (IALA)*, fondita en 1924 en Novjorko, estis la studado, esplorado, diskutado kaj informado pri ĉiuj demandoj rilate la neŭtralan universala-

lan lingvon kun la intenco proponi kaj rekomendi al la registaroj de la mondo maturan projekton por la enkonduko en la edukistemojn de la mondo.

Kun la financa subteno de riĉaj usonaj fondaĵoj kiel Carnegie Corporation, Rockefeller Foundation kaj Research Foundation, sed precipe per la mono de la riĉega mecenatino *Alice Vanderbilt Morris* (1874-1950), la edzino de la usona ambasadoro en Bruselo, I. realigis rimarkindan aktivecon kaj sukcesis gajni la kunlaboron de renomaj lingvistoj. Morris subvenciis ne nur la agadon de I. kaj la salajrojn de la lingvistoj laborantaj por I. mem, sed dank' al la subvencio de I. povis esti eldonitaj la ampleksa *Bibliografio de Internacia Lingvo* de Petro E. Stojan (Ĝenevo 1929) kaj *Originala Verkaro* de Zamenhof (Leipzig 1929). La planata aperigo de la fakperiodaĵo *Journal of Interlinguistic Research* tamen ne okazis.

Kadre de I. oni komencis kompari la unuopajn planlingvajn sistemojn kaj organizis plurajn internaciajn konferencojn, precipe tiujn de 1925 kaj 1930 en Ĝenevo (vd. sube) kaj en 1936 en Kopenhago, dum kiuj la reprezentantoj de la diversaj planlingvoj klarigis siajn ofte neakordigeblajn starpunktojn. Same dum la Dua Internacia Lingvista Kongreso en Ĝenevo en 1931, kiu estis kunvokita de la konata dana lingvisto Otto Jespersen (1860-1943), eminentaj lingvistoj kaj spertuloj pri neŭtralaj universalaj lingvoj interŝanĝis siajn ideojn.

Krome la Instituto Jean-Jacques Rousseau en Ĝenevo, kiu estis direktita de →Pierre Bovet (1878-1969), ricevis de I. la taskon esplori la propedeŭtikan valoron de la instruado de neŭtrala universala lingvo. La konkludoj de tiu grava studo estis pozitivaj (vd. *L'Espéranto à l'école*, en: *L'Education*, Genève 1922; *La paix par l'école / la paco per la lernejo*, Prago 1927) kaj utilis kiel bazo por la konsideroj ĉe →Ligo de Nacioj.

*Konferencoj*: De la 20a de marto ĝis la 2a de aprilo 1930 okazis en Ĝenevo la *Konferenco de lingvistikaj esploroj*, kunvokita de I. Ĝin partoprenis eminentaj lingvistoj kiel Charles Bally, Serge Karcevski kaj Albert Sècheyde de la ĝeneva universitato, →Albert Debrunner (Germanio), →Otto Funke (Svislando), Otto Jespersen (Danlando), kaj signifaj reprezen-

tantoj de la plej konataj planlingvaj sistemoj kiel Siegfried Auerbach (Germanio), membro de la Idista Akademio; Earle B. Babcock (Francio/Usono), prezidanto de I., Wm. E. Collinson (Britio), vicprezidanto de Brita Eo-Asocio kaj membro de la Akademio de Eo, H.S. Eaton (Usono), kunlaborantino de I., Edgar von Wahl (Estonio), aŭtoro de Occidental kaj Reinhold Zeindler (Germanio), verkinto de Ido-vortaro.



P.E. Stojan, *Bibliografio de Internacia Lingvo* (Ĝenevo 1929)

Krome ĉeestis Eduard Hermann (Germanio), Dave H. Morris (Usono), Pitman B. Potter (Usono/Svislando), →René de Saussure kaj Petro Stojan (Svislando). →William Perrenoud (Svislando) protokolis la kunsidojn (→Bibliografio). En rezolucio estis emfazite, ke la reprezentantoj de diversaj planlingvaj sistemoj povas senprobleme kompreni unu la aliajn, ke oni sentas la bezonon adopti simplan kaj politike neŭtralan mondhelplingvon por faciligi la rilatojn inter la popoloj. La subskribantoj de la rezolucio ankaŭ opiniis,

ke ĉiu sistemo posedas siajn apartajn avantaĝojn, sed ke neniu el ili povas pretendi perfektecon, tiel ke estus tro frue definitive decidi pri la elekto de konkreta planlingvo. Dum la konferenco mem la ĉeestantoj konstatis, ke la profesiaj lingvistoj komencis, ĝojige, kvankam malfrue, serioze okupiĝi pri la planlingva demando, kaj ke ili kredas, ke artefarita lingvo estas ebla kaj dezirinda. La koncerna rezolucio substrekis la gravecon, ke diletanteco en la planlingva laboro estu evitata, ke la planlingvistoj serĉu la kontakton kaj konsilojn de profesiaj lingvistoj kaj ke la planlingvistoj nepre apliku la sciencajn metodojn, kiuj en lingvistiko estas kutimaj kaj sukcese elprovataj. Fine oni esprimis en la rezolucio la esperon, ke la kunlaboro inter la reprezentantoj de la unuopaj planlingvoj iam kondukos al la kreado de komuna fronto de ĉiuj planlingvanoj, kio estus granda avantaĝo por la afero de la neŭtrala universala lingvo kaj por ĝia perspektivo de definitiva adopto.

En ĉi tiu kunteksto necesas menciigi ankaŭ la *Duan Internacian Lingvistan Kongreson*, kiu okazis en Ĝenevo en 1931, kaj kiu okupas gravan lokon en la historio de la studado pri la planlingva problemo. Rimarkindan prelegon pri tiu demando faris Otto Jespersen (1860-1943), la aŭtoro de la planlingva projekto Novial (Novial I 1928, Novial II 1934). En sia ĉefraporto Jespersen komentis sian observon, ke la kontraŭuloj de la ideo de neŭtrala universala lingvo inter la sciencistaro malkreskis, kaj li alvokis la lingvistojn ne resti indiferentaj al tiu ideo, kiu laŭ li havas grandegan praktikan signifon. Jespersen montris sin konvinkita, ke la planlingva demando meritis esti atente studata kaj kontentige realigata. La kunlaboro kun I. estis laŭdita, la atendoj en ĝia rolo kiel solvanto de la planlingva demando grandaj. Pri tiu ĉi temo esprimiĝis trideko da partoprenantoj. Favore al ĝi parolis krom Jespersen ankaŭ Edward Sapir (Usono, 1884-1939), Antoine Meillet (Francio, 1866-1936), Matteo Bartoli (Italio, 1873-1946), Christian Uhlenbeck (1866-1951), Charles Bally (Svislando, 1865-1947), Henri Frey (1899-1980), Bruno Migliorini (Italio, 1896-1975), →Albert Debrunner (1884-1958) k.a.

Kvankam I. origine ne intencis lanĉi novan planlingvon, kompreninte sin neŭtrala en

planlingvaj demandoj, ĝia sinteno ŝanĝiĝis post ĉirkaŭ 1933/34, kiam montriĝis, ke interkonsento pri la ununura elektenda planlingvo ne eblas. Al la celpublikoj estis dissenditaj diversaj broŝuroj kun tekstmodeloj kaj enketoj kun kriteriaro pri la dezirinda strukturo de planlingvo, kiuj estis ellaboritaj de W.E. Collinson, profesoro en Liverpool. La eĥo vokis en la naturalisma direkto. Kiam la franca lingvisto André Martinet (1908-99) forlasis I.-n pro malsama opinio kun Alexander Gode-von Aesch (1904-70), la ĉi-lastata akcelis la realigon de siaj ekstreme naturalismaj imagoj, publikigante en 1951 la novan planlingvon *Interlingua* en Novjorko. Kvantkam post la morto de Morris en 1950 finiĝis la monfluo, restis sufiĉe da mono por eldoni la imponan vortaron *Interlingua English Dictionary* kun 27'000 vortoj (anstataŭ la planitaj 10'000), kio okazis la 15an de januaro 1951. En oktobro aperis la unua periodaĵo kaj en decembro la plena gramatiko de Interlingua. La tuta entrepreno kostis proksimume tri milionojn da svisaj frankoj. En 1953 I. estis malfondita kaj anstataŭita de *Division de Interlingua de Science Service*. Post unuaj praktikaj paŝoj en Usono, Interlingua pli kaj pli penetris ankaŭ en Eŭropon, trovante sian vojon ankaŭ al Svislando.  
→Interlingua en Svislando

### **LANGAGE HUMAIN (lingvo, 1900)**

Efemera aposteriora (?) planlingva projekto elpensita de *Umano* (pseŭd.) kaj publikigita en Bern (1900).  
Bibl.: *Umano: Langage Humain*, Bern 1900.

### **LANOPIKŬRO (lingvo, 1907)**

Efemera planlingva sistemo elpensita de *F. David* kaj publikigita en Ĝenevo (1907).  
Bibl.: *Lanopikŭro sera le nom du nouveau langage* (P. Stojan, Bibl. 1929, p. 96).

### **LATIN SIMPLIFIEE (lingvo, 1925)**

Efemera aposteriora planlingva projekto elpensita de *Léopold Reverchon* kaj publikigita en Neuchâtel (1925). Ĝi baziĝis sur la latina lingvo.

Bibl.: L. Reverchon: *Latin Simplifié*, Neuchâtel 1925.

### **LATINO MODERNIGITA (lingvo, 196?)**

Efemera planlingva projekto de *Stefan Bákonnyi*, publikigita en Luzern (196?), kies celo estis modernigi la latinan lingvon (Bákonnyi estis idisto kaj poste adepto de Interlingua/IALA).

### **LINGUA DE EUROPA (Interlingua-Occidental, 1959)**

Efemera aposteriora planlingva projekto, ellaborita de la viena occidentalisto-interlingvisto *Hans Homolka* (pseŭdonimoj: John Christian Homo, Interlinguisticus) kun la celo reformi la lingvon Occidental-Interlingue (1922), t.e. forigi ĉian 'skemismon' en Occidental, enkondukitan de von Wahl, favore al pli naturaj formoj. Samtempe oni distanciĝis de Interlingua/IALA (1951) kun ĝiaj tro 'sudlatinecaj' formoj. Por propagandi tiun sistemon, kiu koncentriĝis pri la normigado de teknikaj nocioj, estis eldonita la bulteno *Amicitie European* (Ed. Gossau, St. Gallen aŭ Wildkirch 1959). En Svislando precipe →Flurin Maissen (→Occidental), eldoninto de la revuo *Li Gymnasiast* (1957-61) en Disentis/GR, rilatis kun Homolka kaj aplikis lian teorion.

Bibl.: *INTERLINGUA-Occidental (Neolatin Angloid), die Lingua de Europa im Werden. Kurzgrammatik. Unter Benützung eines Manuskripts; "Lingua de Europa" von Joh. Chr. Homo. Disentis (Li Gymnasiast) 1959; Homo J. Ch.: Verso li standartisation international de teknik terminologies. (St. Gallen) 1960.*

### **LINGUA EUROPAEA (lingvo, 1959)**

Efemera planlingva projekto elpensita de *W. Schaetzel* kaj publikigita en Ĝenevo (1959). Temas pri propono krei tuteŭropan (scienc-teknikan?) lingvon kun vortaro kun internacia leksiko, kaj pri la klopodo unuigi la ortografion de la internacie uzataj vortoj. Pri la gramatiko mankas klarigoj.

Bibl.: W. Schaetzel: *Lingua Europaea*. En: *Friedenswarte (Blätter für internationale Verständigung*

und zwischenstaatliche Organisation), Genf 1959, Heft 2; A. Bormann in: IIS, 1/1960.

### **LINGUA KOMUN (lingvo, 1900)**

Efemera naturalisma kaj aposteriora planlingva projekto sur la bazo de la nova latina lingvo, ellaborita de *Fr. Kürschner* kaj publikigita en Orselina-Locarno/TI. Ĉi tiu sistemo prezentis en multaj rilatoj analogion al la projekto *Mundolingue* de Julius Lott (1889-90). Kürschner asertis, ke universala lingvo ne devas esti inventita, sed ke ĝi konsistigu sin jam pere de multnombraj ekzistantaj internaciaj terminoj kun latinlingva origino. La sistemo de Kürschner, kiu klopodis reformi Eon, estas ja iom pli latineca, sed sekve ankaŭ pli komplika planlingva varianto. La ĉefa kritiko de Kürschner kontraŭ Eo koncernis ĝiajn derivitajn kaj kunmetitajn vortojn, kiuj povus esti anstataŭitaj per la internaciaj, eĉ ne ĉiam regule formitaj vortoj.

Kelkaj trajtoj de la sistemo:

- La alfabeto uzas la literon *sh* (por *ŝ*).
- La akcento situas sur la lasta silabo, se vorto finiĝas per konsonanto;
- Artikolo: *il, la, les*;
- Substantivo: pluralo *-(e)s*; kazoj ne ekzistas;
- Pronomoj: *mi, tu, ilo, ila, nos, vos; mie, tue, sue, nose, vose*;
- Verbo: infinitivo: *-ar, -er, -ir*.

*Specimena teksto:* Padre nose kuala tu ese in cielo, sante esa tue nómine, vena imperio tue, voluntá tua esa fate sur tera komo in cielo; dé a nos hodi nose pan kuotidian, pardone nose kulpas, kual nos pardona nose kulpantes, ni konduke nos in tentacion, ma libere nos de lu mal.

Bibl.: F. Kürschner: *Die Gemeinsprache der Kulturvölker «Lingua Komun» auf Grund der in allen Kultursprachen verbreiteten internationalen Wörter.* Orselina/Locarno (Tessin) 1900.

### **LINGVISTIKO, LINGVISTOJ**

- Albert Debrunner
- Otto Funke
- Ferdinand De Saussure
- René De Saussure
- IALA
- Max Mangold
- Eduard Schwyzer

### **LINGVO INTERNATSIA**

#### **(de Antido, 1917)**

Ŝanĝoj kompare kun Eo: *tc* anstataŭ *ĉ*, *ts* anst. *c*, *dy* anst. *ĝ* ktp.

*Specimena teksto:* Preskaw tciuj personoj, kiuj okupas sin pri lingvo internatsia, konsentas pri tio, ke la skribo de tiu lingvo devus esti fonetika. Kiam antaw kelkaj jaroj mi proponis reformon de la Esperanta ortografio por dyin pliproksimigi al la naturaj lingvoj, kaj spetsiale al la Latina, Zamenhof skribis al mi leteron por malaprobi mian proponon, kaj li aldonis: „Mi estas tute tserta, ke post kelka tempo vi mem komprenos la malbonetson de via ortografia reformo.” Eble kelkaj personoj diros: se Antido jam unufoje candyis sian opinion pri la alfabeto, kiun garantion ni havas, ke li ne candyos dyin denove post unu aw du jaroj? ...

### **LINGVO KOSMOPOLITA (1912) / LINGVO COSMOPOLITA (1913)**

Unu el multaj reformprojektoj ellaborita far → *René de Saussure* (1868-1943) kaj publikigita en Ĝenevo (1912-13), sur la bazo de Eo. Ŝanĝoj kompare kun Eo: *esis* anstataŭ *estis*, *cienco* anst. *scienco*, *interaltre* anst. *interalie*, *ey* anst. *kaj* ktp. Kompare kun liaj antaŭaj projektoj → Antido I / Antido II L. alportis modifojn de la grafiko kaj fonetiko (ĉ anst. *ĉ*, *j - ĵ*, *ŝ - ŝ*, *x - ks/kz*, *y - j*, *kh - ĥ*).

*Specimena teksto:* I fari talon progreson la scienco sukcesis per la uzado di multan naturanan produktaton, nekonocitan da lan antikun; interaltre kaŭchuko ey gutaperko esis ey restas ankore un nun nedispenseblan por ol.

La propagando de tiu projekto efektiviĝis per la monataj periodaĵoj *Lingvo Kosmopolita* (1912-13), resp. *Lingvo Cosmopolita* (Genève 1913). En *Lingvo Cosmopolita* de Saussure eldonis sian tradukon de la libro *Adèle Kamm* de Paul Seippel, Genève 1914.

→ René de Saussure

## Max MANGOLD

\*1922



Sviso laŭ deveno, M. studis en Bazelo (kie li naskiĝis), Ĝenevo, Parizo kaj Londono. Por Unuiĝintaj Nacioj li aktivis kiel tradukisto ĉe la limo inter Suda kaj Norda Koreio. Ekde 1957 li laboris en la universitato de Sarlando en Saarbrücken (Germanio) kiel profesoro pri fonetiko kaj fonologio. Li regas multajn lingvojn kaj estas konsiderata kiel lingvogeniulo. Tre ŝatataj estis liaj prelegoj pri ĝenerala lingvoscienco kaj liaj multnombraj publikigoj (ekz. *Duden Aussprachewörterbuch*, 4a eld. 2000). M. verkis studojn pri la sarlandaj dialektoj kaj okupiĝis pri la fonetiko de la afrikaj lingvoj, kiujn li komparis kun tiu de la lingvo Eo. M. konkludis, ke por afrikanoj la fonetiko de Eo estas pli facile lernebla, ol la fonetiko de la franca aŭ angla lingvoj.

En sia studo *Die phonetische Überlegenheit künstlicher Sprachen* (1970) M. formulis kelkajn pensojn pri la fonetika kapablo de 'artefaritaj' lingvoj, al kiuj li apartenigis ankaŭ la neŭtralajn universalajn lingvojn. M. konkludis, ke por la celoj de la aŭtomata lingvorekono (automatische Spracherkennung) la artefaritaj lingvoj estus pli taŭgaj ol la etnolingvoj. Koncerne la ĉi-rilatan taŭgecon de Eo M. dubis. La konsideroj de M. pri planlingvoj kaj Eo estas troveblaj krom en la menciita ankaŭ en la sekvantaj kontribuoj: *Kriterien der absoluten und der relativen Schwierigkeit von Sprachen* (1976); *Die Erlernbarkeit von Esperanto im Vergleich zu den Sprachen der EG* (1976); *Sprachwissenschaftliche Überlegungen zur Frage der leichten Erlernbarkeit des Esperanto* (1976); *Das Esperanto-Lautsystem in Afrika* (1979);

*Fonemaj opozicioj en Esperanto (Li kaj Ni, 1985).*

## MONDIALO

→Nov-Esperanto

### NEOLATINO (lingvo, 1947)

Efemera naturalisma (aposteriora) planlingvo konceptita de →*André Schild* (1910-81) sur la bazo de la latina kaj la modernaj romanidaj lingvoj kaj publikigita en Basel (1947). Ĝi aperis kiel kritiko antaŭ ĉio kontraŭ Ido (1907/8) kaj Occidental-Interlingue (1922). Por Schild N. reprezentis la kulminon de la naturalisma skolo en planlingvoj; por li ĝi signifis bonegan sintezon de la modernaj romanidaj lingvoj, kun derivado natura, regula kaj internacia, kun vortaro romanide tradicia, sed moderna („N. ne nur faras, kiel Occidental, la impreson de naturalisma lingvo, sed ĝi estas tia“). Laŭ Schild N. estis la logika konsekvenco de la naturalisma evoluo en planlingvoj, ĉar N. rezignas pri la arbitraj formoj, kiuj karakterizas antaŭajn naturalismajn planlingvojn; ĝi evitas la superflujajn malregulaĵojn kaj uzas mallongigojn (ekz. *cap* anstataŭ *capit*, *masca* anst. *mascare*, *desirar* anst. *desiderar* ktp.). Male al Occidental, kiu aplikas la latinan supinon por siaj infinitivoj, Schild preferis la originan latinan infinitivon (por eviti falsajn verbformojn ekzemple en la germana lingvo laŭ la modelo: Occ. *reducer*, germane: ne *reduktieren* sed *reduzieren*, sekve en N. *reducer*. Analogaj ekzemploj: *discusser-discuter*, *mixer-miscer*, *compresser-comprimer*, *constricter-constringer*, *prescir-prescriber*, *constructer-construir*, *reacter-reagir*, *redacter-rediger*, *absoluer-absolver* ktp). Krom tio N. rezignas pri multaj ĝermanaj etimoj, anstataŭante ilin per romanid-devenaj radikoj (ekz. Occ.-N.: *fingre-dito*, *mann-viro*, *old-velio*, *plugar-arar*, *sand-sablo*, *slifar-amolar*, *storm-tempesta*, *yelb-flavo* ktp.). Aliaj katekterizaĵoj de N. estas:

Substantivoj: *sistema*, *impressione*, *derivacione*, *principio*, *naturalitate*, *valore*.

Artikoloj: sing. *lo*, *la*; plur. *los*, *las*; *un*, *uno*, *una*.

Adjektivoj: *importa, culturale, insuperabile, educativo.*

Pronomoj: *yo, tu, ile, ela, noi, voi, iles, elas; mio, tuo, suo, nostro, vostro, loro, ono* (Eo. oni), *omni* (ĉio), *tanto* (tiom), *questo* (ĉi tiu), *nulo, neco* (nenio), *altro* (alia), *ambos* (ambaŭ), *necuno* (neniu), *co* (kio?), *qui* (kiu?); *plu/meno importa* (pli malpli grava), *lo max/lo min importa* (plej/plej mal-).

Adverboj: *bene* (bone), *melio* (pli bone), *forse* (eble), *apena* (apenaŭ), *anque* (ankaŭ), *iqui* (ĉi tie), *ibi* (tie), *ubi* (kie), *partuto* (ĉie), *hodiae* (hodiaŭ).

Prepozicioj: *in* (en), *ex* (el), *desde* (ekde), *quasi* (kvazaŭ), *ante* (antaŭ), *pos* (post), *pri* (pri), *apud* (apud), *che* (ĉe), *second* (laŭ), *detra* (malantaŭ), *circum* (ĉirkaŭ).

Konjunkcioj: *e* (kaj), *o* (aŭ), *ca* (ĉu, germ. ob), *con* (kun), *ma* (sed).

Numeraloj: *uno, du, tri, quattro, cinque, sex, septe, octo, nove, deci.*

*Specimena teksto:* Lo Neolatino es una excelente sintese de las lenguas romanicas modernas con egardo a loro elementos in los idiomas germanicos e slavos. Sua derivacione es naturale ed internacionale; suas desinencias son comunes a las lenguas italiana, hispana e portughese. Lo Neolatino non face, come Occidental, solo l'impressione de una lingua naturale, ma ile es pura e simplemente una tale).


*Reagoj:* Pluraj elstaraj planlingvistoj kiel →Alphonse Matejka kaj profesoro Ugo Cassina, membro de la Academia pro Interlingua (Latino sine Flexione), laŭdis la laboron de Schild. Ĉirkaŭ lia kreaĵo formiĝis eĉ malgranda movadeto, kiu nomis sin *Grupo internacionale neolatinista de corespondentes*. Ĝin gvidis kvinmembra *Comitato Linguistico* al kiu apartenis krom Schild kiel prezidanto ankaŭ alia sviso, iu A.E. Cortinas el Lugano-Scarpina/TI. N. trovis adeptojn precipe en Belgio, Hispanio, Italio, Nederlando kaj Portugalio. Ilin unuigis *Buletino del Grupo internacionale neolatinista de corespondentes*, eldonita en Basel, kie troviĝis centra oficejo (*Oficio Centrale*). Post la publikigo de Interlingua/IALA en 1951 Schild forlasis la propran projekton kaj adpotis la lingvon de Alexander Gode, ludonte mem gravan rolon en lia movado.

Cetere N. de Schild ne estu intermiksita kun la projekto Neolatino de iu P. Lundström en Svedio (1926-28).

Bibl.: A. Schild: *Petite grammaire Neolatine. Grammaire-Textes-Vocabulaire.* Basel (1947).  
→Interlingua en Svislando →Bibliografio

## **NOV-ESPERANTO / IDIOMO MONDIALO (lingvoj, 1925-32)**

Unu el multaj reformprojektoj sur la bazo de Eo, ellaborita far →*René de Saussure* (1868-1943) kaj publikigita en Berno/Ĝenevo (1925-32). Temas pri projekto iom modifinta la antaŭajn sistemojn. N. konsideris sin pli-bonigita Eo, konservante ĝiajn esencajn trajtojn. Ŝanĝoj estis faritaj en la grafiko (abolitaj supersignoj), en la afiksa sistemo (-ev- anstataŭ -iĝ-, yer- anst. -uj-, -uk- por la vira besto ktp.), gramatiko (*bona patron* anst. bonaj patroj, *hi* anst. li, *nina* ktp. anst. nia ktp., -oy! anst. -u! kaj en la korelativa tabelo. N. abolis la korelativon -*omni*, uzitan en Esperantido kaj anstataŭis ĝin per *ch-*; krome estas aplikata *ipl-* anstataŭ -obl. Ĉ. 300 bazaj vortoj malkongruas kun Eo, pro ilia romaniĝo. Tamen la plimulto de la *mal-*vortoj kaj la principo de neceso kaj sufiĉo ĉe la vortderivado estas konservitaj. Skemigitaj estas la lokaj prepozicioj (*anter, poster, infer, dexter, sinister, cirker, konter, norder, suder, eoster, wester, intro, extro, supro* ktp.). Aliaj ŝanĝoj koncerne la ordinalajn ciferojn kaj jenajn ekzemplojn: *rukveni* anstataŭ reveni, *tarde* anst. malfrue, *probo* anst. provo, *onle* anst. nur(e), *poke* anst. malmulta k.s.



**Die Hilfsprache**  
**„MONDIALO“**  
**(Neu-Esperanto)**  
für Schule, Selbstbildung und Weltverkehr

*Specimenaj tekstoj:* Nov-Esperanto estas nova formo de la lingvo Esperanto, kreita da Dro Zamenhof. Ta nova formo ne pretendas esti nova lingvo internacia: ĵi celas nur forigi el Esperanto a defektun, jenanta en la praktika aplikado de ci-ta lingvo, exemple la supersignita literun ey la tro ofta finajun. Tala rezulto oni povas atingi per simpla interĉanĵo de la tri gramatika finajon -aj, -oj, -uj; seĝe, ĉa Esperantisto povas lerni Nov-Esperanto en poka horon. Estas ya diversa altra reform-projekton de Esperanto, el kayn la ple konatay estas la lingvo Ido, sed el ĉa ta projekton Nov-Esperanto estas la solay, kay konservis netushita la strukturu ey la flexeblu de la Zamenhofa kreitajo. Mia unema probo de reformo estis publikigata en la yaro 1919ma sub la nomo 'Esperantido', sed dur plura yaron mi faris en ĵi diversa plibonigon, ey por eviti konfuzun, mi vicerigis la nomu 'Esperantido' per 'Nov-Esperanto'. Ci-ta lasta nomo estas do lay de la definitiva reform-projekto. (1928)

Una vidvino avis du filinun. La pli olday estis ti simila al la patrino per sia karaktero ey vizajo, ke cholo, kay chu vidis, povis pensi, ke hi vidas la patrinu. Kite ta bela knabino venis aldome, shia patrino insultis shu, pro ko shi rukvenis ti tarde de la fonto. „Pardonoy al mi, patrino“, diris la malfortuna knabino, „ke mi restis ti longe“. Ey kite shi parolis ci-ta vortun, elsaltis el shia boko tri rozon, tri perlon ey tri granda diamanton. (1929)

Patro nina kay estas en la cielo, sankta estoy vina nomo, venoy rejeco vina, estoy volo vina, kale en la cielo, tale sur la tero. (Stojan 1929, p. 525)

Nov-Esperanto ne pretendas esti nova lingvo internacia; ĵi estas onle Esperanto senigita ye kelka difekton, jenanta en la praktika aplikado de ta lingvo, exemple la diakrita literon ey la tro ofta finajon. Tala rezultatu oni povas atingi per simpla interĉanĵo de la tri gramatika finajon -u, -n, -oj; seĝe, ĉa Esperantisto

povas lerni Nov-Esperantu en poka horon. (Genevo 1932)

3-4-foje jare aperis la periodaĵo *Internacia lingvo Nov-Esperanto* (Bern-Neuchâtel, 1925-28). En 1925 de Saussure (Antido) relanĉis en Bern sian *Teknikan Revuon*, kiu jam aperis en 1918/19, aplikante la sistemon N. En 1935 Antido nomis sian lingvon *Universal-Esperanto* kaj en 1937 → *Esperanto II*. En 1932 estis ankaŭ ŝanĝitaj la vortoj *reformo* al *riformo*, *solay* al *onlay*, *probo* al *provo*, *plibonigojn* al *plibonigun* ktp.

Bibl.: R. de Saussure: *Antido. Fundamenta Krestomatio de la internacia lingvo Nov-Esperanto*. Bern 1925, 2a eld. 1926.

→ Antido I / Antido II, → Lingvo Kosmopolita / Lingvo Kosmopolita kaj → Esperantido / Esperantida.

→ René de Saussure → Bibliografio

### **PARLAMENTO (lingvo, 1918)**

Efemera projekto de planlingvo kun miksitaj aprioria-aposteriora karaktero, elpensita de la instruisto *Geo Ferry* (pseŭdonimo de *Georges Perrier*) kaj publikigita en St. Imier/BE en 1918. Kun la celo fari Eon pli praktika la aŭtoro de P. faris laŭ propra eldiro kelkajn plibonigojn de Eo kiel: aplikado de la francitala sintakso, forlaso de la germaneca deklinacio de Eo, fonetika ortografio, uniformigo de la verba sistemo, rezigno pri konjunktivo (fr. subjonctiv) kaj pasinteco (fr. préterit), plisimpligo de la 'nevariaj' vortoj (adverboj, prepozicioj, konjunkcioj ktp.). Per tiuj ŝanĝoj la aŭtoro esperis, ke la lingvo estos pli akceptebla ekzemple por afrikanoj. Li deziris, ke P. fariĝos „civila“ kaj komerca lingvo. Laŭ teksto publikigita en la broŝuro, la prezidanto kaj unua sekretario de la Komerca Societo de St-Imier deziris al la projekto F. plenan sukceson. La gazeto *L'Impartial* (La Chaux-de-Fonds, 6.11.1997) publikigis artikolon pri tiu lingvoprojekto.

*Specimena teksto:* Ona sculoro dizas on dio a sa maestro: „Tempo estos pasy de studiore molti lingvo: Por me, ik non avos tempo d'an studiore on dumi duzeno. Vala perke ik vulos legnare la 'Parlamento'“.

Bibl.: (Perrier G) G. Ferry: *Parlamento, nouvelle langue internationale*. St-Imier 1918.



## **REFORMITA ESPERANTO** **(proponoj en la broŝuro *Les 'tares' de l'espéranto / Die 'Mängel' des Esperanto, 1917*)**

En ĉi tiu versio, →*René de Saussure* faris jenajn ŝanĝojn kompare kun Eo: *q* anstataŭ *ĝ*, *avi* anst. *havi* ktp.

*Specimena teksto:* Unu vidvino avis du filinojn. La pli maljuna estis tiel simila al la patrino per sia karaktero kaj vizaĝo, ke ĉiu, kiu shin vidis, povis pensi, ke li vidas la patrinojn; ili ambaw estis tiel malagrablaj kaj tiel fieraj, ke oni ne povis vivi kun ili. La pli juna filino, kiu estis la plena portreto de sia patro laŭ sia boneco kaj honesteco, estis krom tio unu el la plej belaj knabinoj, kiujn oni povis trovi. Kiam tiu ĉi bela knabino venis domon, ŝia patrino insultis shin, kial ŝi revenis tiel malfrue de la fonto. „Pardonu al mi, patrino”, diris la malfeliĉa knabino, „ke mi restis tiel longe”. Kaj kiam ŝi parolis tiujn ĉi vortojn, elsaltis el ŝia busho tri rozoj, tri perloj kaj tri grandaj diamantoj.

## **Ferdinand DE SAUSSURE**

1857-1913



La mondkonata svisa lingvo-sciencisto kaj signifa hindeŭropisto el Ĝenevo, kiu estas konsiderata kiel iniciatinto aŭ almenaŭ kiel grava kontribuinto de la moderna lingvistiko (strukturalismo, semiologio), observis kun intereso la evoluon de la neŭtralaj universalaj lingvoj ĝenerale kaj de Eo aparte, pozitive prijuĝis la eblojn kaj utilon de tiaj lingvoj kaj en si mem aprobis la lingvon Eo. La demando de la planlingvo estas traktita en sia epokfara universitata prelegaro (kiu estis postmorte publikigita en rekonstruita formo sub la titolo *Cours de linguistique générale*, 1916), en kiu S. starigis la ĝeneralan teorion de la

lingvo kiel semiotika sistemo de signoj kaj formulis la diferencon kaj kompleksan interdependencon de ‘langage’, ‘langue’ kaj ‘parole’. Laŭ S. la lingvo estas perceptenda kiel socia sistemo de signoj, ankrita en la homa kulturo, kiu esprimas certajn ideojn. Dank’ al la socia karaktero, kiun lingvo havas, la lingvo, uzata de ĝiaj uzantoj, do daŭre ŝanĝiĝas.

Surbaze de tiu teorio S. prognozis, ke nepre ĉiu aplikata idiomato, disponanta diakronan dimension, inkluzive de Eo kiel artefarita lingvo, ne povos resti konstanta, sed neeviteble evoluos kaj submetos sin al certagradaj ŝanĝiĝoj kiam ĝi estos vaste praktikata. Kiel aliajn tiajn sistemojn krom la lingvo mem S. menciis la skribon, la alfabeton, la lingvon de la gestoj, la armeajn signalojn k.a. Kutime la parolantoj ne konscie rimarkas tiujn ŝanĝojn. La disĉiploj de S., Albert Sècheyne (+1946) kaj Charles Bally (1865-1947), kiuj eldonis lian *Cours*, ankaŭ agnoskis la ekzistojn de artefaritaj lingvoj.

→René de Saussure

## **René DE SAUSSURE**

1868-1943



S. estis ano de la ĝeneva branĉo de konata patricia sciencista familio lotaring-devena: li estis la pranepo de Horace-Bénédict S. (1740-99), kiu surgrimpis unufoje la Monton Blankan (kaj al kiu estis dediĉita la 20-svisfranka monbileto en la serio de la 1970-90aj jaroj). S. estis la filo de Henri S. (1829-1905), konata zoologo-entomologo kaj honordoktoro de la ĝeneva universitato. La fratoj de S. estis Horace de S. (1859-1926), konata pentristo, Léopold de S. (1866-1925), maristo kaj ĉinologo, kaj →Ferdinand de S. (1857-1913), fama lingvisto kaj filologo, kiu

pozitive esprimiĝis rilate la funkciadon de internacia planlingvo ĝenerale kaj Eo aparte. *Biografiaj notoj:* S. naskiĝis en Ĝenevo, vizitis la gimnaziojn en Ĝenevo kaj Parizo (Sainte-Barbe) kaj faris la abituriantan ekzamenon en 1886. En 1895, studinte en la pariza politeknika lernejo kaj en la universitato John Hopkins en Baltimore (Usono), li doktoriĝis pri filozofio kaj matematiko. 1895-98 li aktivis kiel eksterordinara profesoro pri matematiko en la katolika universitato en Vaŝingtono/DC, kaj en 1904 li estis nomita privatdocento pri matematiko en la ĝeneva universitato. En 1913, jaro de la morto de Ferdinand, R. translokiĝis de Ĝenevo al Berno, en kies universitato dum 1920-25 li instruis geometrion kiel privatdocento. S. estis honora doktoro de la ĝeneva universitato, delegito de la Fizika Societo de Ĝenevo, membro de la Ĝeneva Societo kaj laŭreato de la Franca Instituto (1916). S. edziĝis dufoje kaj havis evidente du filojn: Jean S. (1889-?), naskita en Vaŝingtono, fariĝis teologopastoro en Edinburgo, ekde 1929 vivis en Ĝenevo kaj famiĝis en protestantaj medioj pro la eseo *La kontraŭdiroj de la religia penso* (1926). Lia dua filo naskiĝis menskripla.

*Esperanto kaj planlingvoj:* Kiel S. mem raportetis pri sia interesiĝo pri la neŭtrala universala lingvo (→ Esperanto II), li vizitis hazarde la 2an Universalan Kongreson en Ĝenevo (1906), fariĝis e-isto kaj partoprenis la fondon de Internacia Scienca Asocio E-ista (ISAE), kie oni elektis lin sekretario. Laŭ raporto de → Edmond Privat, kunlaboranto de René, Ferdinand ne deziris mem partopreni la kongreson pro la timo, ke lia persona partopreno povus esti misinterpretata de la publiko. Sekve li delegis sian fraton René kiel observanton. La Eo-movado rikoltis el tiu kongresano multflankan samideanon kaj elstaran esperantologon-interlingviston, traŭn analizanton, sed ankaŭ eternan reformemulon, iom tragikan, unike en la historio de la planlingvoj. Rilate la laboron por Eo kaj la planlingva ideo de S. distingeblas pluraj periodoj.

*Kunlaboranto en la Eo-movado (1906-25):* En 1906, kiel vicprezidanto de la Ĝeneva E-ista Grupo, S. malfermis kaj direktis la Internacian Sciencon Oficejon E-istan en Ĝenevo

(strato Bovy-Lysberg 8), kie estis redaktata kaj administrata *Internacia Scienca Revuo*. Dum pli ol 5 jaroj S. estis ĉefredaktoro de tiu revuo. → Hector Hodler kaj → Edmond Privat, la fondintoj de UEA, fariĝis liaj kunlaborantoj. Lia redaktejo servis samtempe kiel unua oficejo de UEA, kiun ludonis S. (en aŭtuno 1909 la oficejo translokiĝis al strato Bourse 10, kie UEA okupis la ĉefan spacon). Kiel membro de la Eo-Akademio S. gvidis la sekcion pri vortfarado (1911-19) kaj pri teknika vortaro (1912). Kiel vicprezidanto de la 9a UK (Berno 1913) li prezidis ĝian akceptan komitaton kaj faris la kongresparoladon (anstataŭ L.L. Zamenhof). Li kunlaboris kun diversaj gazetoj: *Tra la Mondo*, *La Revuo*, *Esperanto*, *Oficiala Gazeto* (de la Lingva Komitato kaj de la konstanta kongresa komitato), *Esperanta evoluo*, *Literatura Almanako* (Paris 1909-10) kaj mem estis ĉefredaktoro de *Internacia Scienca Revuo* (1907-10) kaj *Svisa Espero* (1909-10 kaj 1916-18). En 1918/19 li redaktis *La Teknika Revuo* (kiun li relanĉis en 1925, aplikante reformitan ortografion). En 1908/9 li prezidis SESn, kiu en 1911 nomis lin honora membro. Krome en 1907/14 li elpensis kaj proponis la internacian monsystemon → Spesmilo, kiu estis akceptita de la 3a UK, kaj li sugestis ankaŭ universalan kalendaron. Li ĉeestis la UKn en Kembriĝo (1907), Dresdeno (1908), Barcelono (1909) kaj Antverpeno (1911) kaj propagandis Eon ankaŭ inter oficiroj de la svisa armeo. S. multe interesiĝis pri la demando de la organizado kaj kunordigado de la multiĝintaj internaciaj asocioj pere de tegmenta organizaĵo (vd. la broŝureton *Univo de la internacian asocion*, *Bruxelo*. Bern 1920).



Titolpaĝo de *Internacia Scienca Revuo*, unua periodo en Ĝenevo

*Esperantologo (1910-17)*: La apero de la reformprojekto Ido (1907/8) kaj de la ĝin sekvantaj esperantologiaj diskutoj instigis S. science analizi la teorion de la Eo-vortfarado, en kio li atingis kvazaŭ revoluciajn rezultojn. Ĉi tiu elstara teoria kontribuo de la ĝeneva matematikisto estis prezentita en la verkoj *La construction logique des mots en Espéranto* (1910) kaj en *Resumo de la teorio de Antido kun lingvaj kritikoj kaj klarigoj de konataj esperantistoj kaj idistoj* (1910). En tiuj verkoj la aŭtoro klare kaj detale ellaboris la sistemon de la triopa radik-divido kaj finaĵa pluformado (vd. *PAG* 1985, p. 383) kaj eklumigis la esencon de la vortfarado de la lingvo Eo, kiun li deklaris supera kompare kun aliaj planlingvoj; kiel unua li formulis la principon de neceso kaj sufiĉo (*trinkemo* anstataŭ *trinkemeco* ktp.) kaj, ilustrante la gramatikajn kategoriojn de Eo, li pruvis la logikon inter la ideoj substantiva, adjektiva kaj verba kaj la koncernaj sufiksoj, respektive la rilaton aŭ kongruecon inter la ideoj entenataj en la finaĵoj kaj la ideoj entenataj en la vortradikoj aŭ en la afiksoj (a=ec, o=ul, i=ad). Tiel *Antido* (pseŭdonimo de S.) konvinke kontraŭargumentis la vortderivatan teorion de Louis Couturat. Pri Ido S. opiniis, ke ĉi tiu lingvo estas tute fremda al la spirito de Eo kaj ke per sia tro rigida derivsistemo Ido detruis la rimarkindan flekseblon de Eo. Por siaj analizoj S. konsideris ankaŭ la naturalistajn projektojn Occidental kaj Latino sine flexione. S. opiniis, ke estus „vera frenezaĵo“ forlasi la esperantan bazon kaj la grandegan laboron, kiu jam estis plenumita de la e-istoj.

La konkludoj de tiu samtempe unua scienca vortstruktura analizo pri Eo grave influis la lingvo-evoluon de Eo, la Eo-uzantojn kaj Eo-verkistojn, inkluzive de Zamenhof mem; pro tio la verko de S. meritas esti konsiderata kiel fundamento de la Eo-vortfarado. La eseo *La construction logique des mots en Espéranto* estis plene laŭdata de L.L. Zamenhof (vd. *PAG* 1985, p. 383 *OV*, p. 455) kaj de aliaj gravaj e-istoj kiel ekzemple Wüster, Isbrücker, Neergard, →Jean Borel. Zamenhof skribis al S.: „La (...) verkon mi legis kun granda intereso; mi trovas ĝin bonega. Laŭ mia opinio estus tre utile, se vi eldonus ĝin ankaŭ en Eo, por ke ĉiu e-isto, precipe la verkantoj, atente ĝin tralegu kaj por ke ili

penu observi tiujn principojn, kiujn vi bonege esploris kaj klarigis. Mi ne dubas, ke nia Akademio tre volonte donos al via propono sian oficialan aprobon... Via verko povas servi kiel bona modelo de efektive gravaj kaj utilaj Akademijaj laboroj.“ (1910, *OV*, p. 455).



Rara foto de René de Saussure en la gazeto *Die Umschau* (1932)

En 1917 S. aperigis, kiel suplementon al *Svisa Espero*, sian *Projekton de fonetika skribo por la lingvo internatsia*, ĉar tiutempe ekflamis en diversaj landoj la diskuto pri la reformado de la nacilingva ortografio. En tio S. klare avertis, ke li ne deziras reformi Eon, ĉar Eo estus la definitiva formo de la mondlingvo. Tamen pri la alfabeto oni povus diskuti, kaj reformo de la alfabeto ne estus reformo de la lingvo. Ĉar la Eo-alfabeto ne estus tute fonetika, provo je ĝia reformo estus pravigebla. Al la *Asotsio por fonetika alfabeto internatsia* aliĝis pluraj personoj kiel ekzemple →Auguste Forel, →Emma Chenevard kaj la germano Max Butin. S. mem estis la sekretario de tiu asocio, kies adreso estis ĉe Hotelgasse 10, Bern (1917).

En 1917 aperis ankaŭ lia broŝuro kun la titolo *Les 'tares' de l'espéranto / Die 'Mängel' des Esperanto*, en kiu li prezentis dek laŭdirajn difektojn de Eo, listigitajn de la t.n. „plibonigantoj“ de Eo.

Dum la Akademio de Eo rifuzis la tuton de la teorio de S., ĝi oficiale akceptis la principon de neceso kaj sufiĉo (1912-13). La sama akademio ne plu okupiĝis pri tiu afero ĝis 1966 kaj oficiale akceptis la nomitan teorion nur en 1967! (vd. *PAG* 1985, p. 386-388).

*Rezigno pri Eo kaj reformprojektoj (1907-37):*

La 1an de septembro 1925, en la jaro de nova UK en Ĝenevo, S. komunikis en cirkulero, ke li ĉesas nomi sin e-isto, ke li decidis forlasi la Eo-standardon kun verda stelo sur blanka fundo, kaj ke li levis la standardon de la lingvo →Nov-Eo kun blanka stelo sur verda fundo. Daŭre nomante sin „diciplo (tiel!) de Zamenhof“, eĉ ankoraŭ en la jaro 1932, S. admonis la e-istaron, ke ilia kontraŭstaro kontraŭ la reformoj de la lingvo Eo estas danĝera por la estonto de Eo, kaj ke en sia nuna formo Eo ne taŭgas por la scienco, nek por la komerco. Por savi la ideon de neŭtrala universala lingvo li vidis nur unu solvon: konservi la strukturon de Eo kaj la ortografion de Ido (sen supersignoj), modifi la zamenhofan pluralon *j*, kies tro ofta ripetado estas ĝena, kaj por la okulo, kaj por la orelo. Tiujn reformojn li realigis en sia Nov-Eo. Dum plenaj tri jardekoj S. dediĉis sin al eksperimenta laborado. Inter 1907 kaj 1937 li publikigis tutan serion da reformprojektoj, kiuj tamen neniam kontentigis lin kaj kiujn li sinsekve kaj konstante remodifadis (M. Monnerot-Dumaine nomis ilin „les espérantides“, kaj en la kazo de Esperantido, 1921, S. mem parolis pri dialekto de Eo).



René de Saussure serĉis sian propran planlingvan vojon: *La Vojo*, revuo pri reformoj el la jaro 1921

Akiri superrigardon pri tiu ĝangalo de konfuzaj lingvo-reformprojektoj kun diversaj titoloj kaj aŭtoraj nomoj estas vere nefacile kaj temporabe, ellabori klarajn diferencojn inter tiuj projektoj eblas nur en limigita maniero pro manko de sufiĉe disponebla lingva esplormaterialo. Kutime la eldonemulo publikigis siajn projektojn sub la vojmontra

pseŭdonimo *Antido* (t.e. kontraŭ Ido). Jen la titoloj de liaj lingvo-reformproponoj en kronologia vico: →Lingvo Internacia di Antido 1 (1907), →Esperanto de Antido 2 (1910), →Lingvo Kosmopolita (1912), →Lingvo Kosmopolita (1913), →Lingvo Internatsia de Antido (1917) →Esperantido (1919), →Nov-Esperanto aŭ →Mondialo (1925-32), →Universal-Eo (1935), →Esperanto II (1937). La informo, ke en 1913 (?) S. prilaboris la projekton *Konkordia* aŭ *Konkordio*, ne estas certa. Interese estas, ke ĉe *Konkordo* (Ĝenevo 1911) temis ne nur pri periodaĵo, sed evidente ankaŭ pri „partio newtrala“. Por diskonigi tiujn proponojn S. kutime verkis kaj publikigis propagandilojn, broŝurojn, cirkulerojn, lernolibrojn, vortarojn kaj krestomatiajn kaj eldonis periodaĵojn. Ĉar S. apartenis al riĉa familio, li havis la okazon roli kiel mecenato kaj trovi la financojn por siaj propraj eldonaĵoj el la heredita kapitalo, kiu estis je dispono. En sia berna periodo evidente ekmanis mono por tiuj agadoj, kaj S. devis mem perlabori sian salajron.

Gravan asiston la projektoj de S. ricevis per la kunlaboro de →Emma Chenevard (1884-1939) el Neuchâtel, kiu transprenis la taskon de sekretariino de la Akademio Esperantida (ĉ. 1924) kaj pli malfrue de la Nov-Esperanta Akademio (1932). Krom tio ŝi verkis lernolibron de la lingvo Esperantido. Estas ankaŭ interese noti, ke kun la lingvo Esperantido S. celis starigi movadeton Esperantidan: La unua grupo Esp-ida estis fondita en Planice, Bohemio. Sekvis grupoj en Berno (d-ro Edoard Guillaume kiel prezidanto de la grupo kaj poste de la Akademio Esperantida) kaj en Ĝenevo (sub la estrado de R. Favre). Eĉ al lingvokurso aliĝis 12 lernantoj. La edzino de S. verkis, sub la pseŭdonimo Antidantino, la muzikon de *L'Espero*, la himnon de Esperantido.


*Resumaj konkludoj de S. en 1925:* En cirkulero de oktobro 1925 al la „Nov-Esperantistaro“ S. faris jenan konkludon de sia ĝisnuna aktiveco, en sia nova lingvo: „Dum preske 20 yaron mi serĉis voyu por adapti la lingvu de Zamenhof al la bezonon de la scienco k. de la komerco, kar al mi shaynis, ke la voyo seqata da la Idiston ne estas la justay. Hili kreis tute nova lingvu kay la 18-yara experimentado, kiaŭ hili faris,

montras, ke Ido ne estas pli bona ol Esperanto; hili certe forigis la chefan difektun de la Zamenhofa lingvu (per chanjo de la alfabeto k. de la plursigno); sed hili komplikis la strukturu de la lingvu kaj igis ju pli rigida per forigo de la deviga akuzativo k. de la akordo de l'ajektivo. Rifirmi Esperantu, sen chanji ties strukturu, nek ties simplecu, estis tre malfacila tasko, kay mi konfesas, ke mi ofte perdis kuraju or seqis eraran voyun. Mi faris multan diversan proponun kaj tie perdis la konfidu de multan samideanon, kiayn kredis, ke mi havas spiritu chanjema k. neniam atingos mia celu. Tame, ne atentante la kritikun, nek la mokun, mi daŭrigis labori, jis kiam mi truvis definitiva k. kompleta solvu de tia malfacila problemo. Kar mi ne havas la geniu de Zamenhof, mi bezonis multan yarun por kompletigi mia laboru kay poluri chian detalun de la lingvo. Nun la entrepreno estas finita, kay la rezultato estas: Nov-Esperanto.“

*Kritiko kaj pravigo:* Kiel eblas konstati laŭ pluraj dokumentoj, dekomence S. emfazis, ke lia celu ne estas forlasi la strukturon de la lingvo Eo, sed fari en ĝi kelkajn modifojn kaj plibonigojn, por pliefikigi la propagandon de Eo „konforme al la postuloj de la moderna vivo“, plivalorigi ĝin kiel sciencan lingvon kaj trovi interkonsenton kun la idistoj. La ĉefa kritiko de S. koncernis la ortografion, la supersignojn, la korelativojn, la akuzativon kaj la pluralon (do la morfologion) kaj iom la leksikon. En la barcelona UK (1909) li klarigis al la e-istoj, ke ili ne paniku, kiam sciencisto aŭ lingvo-teoriulo faras lingvistikan analizon pri Eo kaj alvenas al diverĝaj konkludoj en iuj detaloj. Tamen la sugestoj de S. estis akceptitaj nek de la e-istoj, nek de la idistoj. En 1911, sub la premo de la viglaj kontraŭstaroj kontraŭ la proponitaj reformoj flanke de la svisaj e-istoj, kiuj kredeble miskomprenis la intencojn de S., li rezignis esti reelektita kiel prezidanto de SES. Ankaŭ la Akademio de Eo ignoris liajn reformproponojn kaj en 1920 eĉ eksigis lin el sia sino. Hector Hodler nomis liajn reformprojektojn, kiuj fariĝis pli kaj pli konfuzaj kaj bizaraj, „karikaturaj de Eo“. Eĉ de L.L. Zamenhof S. ricevis skriban averton: „Mi estas tute certa, ke post kelka tempo vi mem komprenos la malbonecon de via ortografia reformo“. S. konfesis, ke la majstro estis prava.



Svisaj e-istoj en Soloturno (1909): Emma Herzog, Jakob Schmid, Fritz Wenk, René de Saussure kaj Eduard Stettler



Jakob Schmid, Hector Hodler, René de Saussure kaj Edmond Privat

Tiel S. izoliĝis pli kaj pli kaj perdis sian influon en la Eo-movado. Tamen liaj rilatoj kun la e-istoj restis afablaj kaj karakterizataj de reciproka estimo. Malgraŭ tiuj diferencoj en la planlingva diskuto S. ne transiris al Ido, kies superracion kaj francecan vortkonstruadon li prijuĝis ne konforma al la spirito de Eo. Male, en serio da brilaj analizoj kaj mo-

nografioj li defendis Eon kontraŭ idistaj atakoj, precipe en *Respondo al la oficiala raporto de la Delegitaro* (Ĝenevo 1911), kaj en *Konkurso: kia estas la logika senco de l'vorto «grando»?* (1911). Ĝenerale oni agnoskas, ke dank' al la kontribuo de S. sur la kampo de la vortfarado, la tezoj de la Ido-protagonisto Louis Couturat povis esti kontraŭ-argumentitaj, la franca stilo de Louis de Beaufront en Eo malkreskis, la Budapeŝta Skolo pretiĝis kaj esperantologio ekestabliĝis. La vortfaradaj teorioj de S., kiu cetere ankaŭ iom partoprenis la laborojn de →IALA, estis malkovrataj kaj pluevoluigitaj de Eugen Wüster, Kálmán Kalocsay kaj Gaston Waringhien (1901-91), dum aliflanke Herbert F. Höveler (E. Ĉefeĉe), la legendeca aŭtoro de la *Eo-Ŝlosiloj*, vane provis kontraŭi ilin; István Szerdahelyi iom relativigis ilian korektecon.

Supozeble la ĉefa eraro de S. estis, ke li preteratentis, ke Eo estas pli ol nur lingvosistemo laŭplaĉe kaj arbitre reformebla. Li subtaksis la socilingvistikan kaj socian dimensiojn de la Eo-movado kaj ankaŭ la konservemon de la e-istaro, kiu konsideris la zamenhofan fundamenton „sankta“. Pro tio S. neeviteble alfrontis la negativajn reagojn de la e-istoj kontraŭ liaj ja sendube bonintencaj, sed evidente maltrafaj proponoj. La fervora publikigemulo ĉiam diskonigis siajn ideojn tro frue, tro rapide kaj tro vaste, antaŭ ol submeti ilin al profunda ekzamenado fare de aliaj kompetentuloj. Resumante la ecojn de la verkado de S., Kalocsay trovis por sia *Rimportreto* jenajn trafajn strofojn:

„*Saussure, - la pura, klara Mens'*  
*la projektinto, projektonto*  
*Trabilis, kvazaŭ lumofonto*  
*La vortstrukturon lia Lens'*  
*Ascendis el vort-arba dens'*  
*Kiel la av' al Blanka Monto*  
*Saussure - la pura, klara*  
*Mens'*


*La projektinto, projektonto.*  
*Ne senmerita la incens'!*  
*Al tre nebula horizonto*  
*Pluiris li, sed post renkonto*

*La nia restis lia Pens'!*  
*Saussure, - la pura, klara*  
*Mens'".*

- Lingvo Internacia di Antido I
- Esperanto de Antido II
- Lingvo Kosmopolita →Lingvo Cosmopolita
- Lingvo Internatsia de Antido
- Esperantido
- Nov-Esperanto aŭ →Mondialo
- Reformita Esperanto
- Universal-Eo →Esperanto II
- Emma Chenevard →Eduard Debrunner
- Otto Funke →Auguste Forel →Hector Hodler
- Ernest Naville →Gonzague de Reynold
- Ferdinand de Saussure
- Svisa Esperanto-Societo
- Kultura Centro Esperantista
- Universala Esperanto-Asocio
- CDELI →IALA →Instruado de Esperanto
- Bibliotekoj & Ekspozicioj →Literaturo
- Spesmilo →Pseŭdonimoj →Turismo →Berno
- Ĝenevo →Neuchâtel →Vaŭdo

## **Eduard SCHWYZER**

1874-1943



La zurikano S. estis konata svisa lingvisto (hindeŭropisto kaj grekologo), kiu studis klasikan filologion, hindeŭropan lingvosciencan kaj grekan lingvon en Zürich kaj Leipzig. En 1897 li faris la ŝtatan ekzamenon kaj la sekvan jaron li doktoriĝis pri kompara lingvoscienco, sanskrito kaj klasika filozofio (summa cum laude). Post kiam li laboris kiel lingvoinstruisto en Soloturno, en 1898 li transprenis la redaktadon de *Schweizerisches Idiotikon* (poste: *Schweizerdeutsches Wörterbuch*). Post sia habilitiĝo (1902) S. akceptis postenojn kiel privatdocento. En tiu funk-

cio S. prezentis sian debutan prelegon pri la temo 'Die Weltsprachen im Altertum in ihrer geschichtlichen Stellung' (La mondolingvoj en la antikva tempo en sia historia pozicio). Kiel eksterordinara profesoro li debutis pri la temo 'Lingvo kaj religio' (1910) por en 1912 finfine fariĝi, kiel posteulo de Adolf Kaegi, ordinara profesoro pri kompara hindeŭropa lingvoscienco kaj parencaj sciencoj. Liaj sekvaj sciencaj meritoj kondukis lin en 1926 al la universitato de Bonn (Germanio). Pro la emeritiĝo de Wilhelm Schulze S. avancis en 1932 al lia katedro pri hindeŭropa lingvo-komparo en Berlino, kie estiĝis lia *Griechische Grammatik*, ampleksa verko prilaborita surbaze de la gramatiko de Karl Brugmann kaj poste kompletigita kaj eldonita de →Albert Debrunner. Sekve S. fariĝis membro de la Prusa Akademio de Sciencoj kaj redaktis gravan revuon sur la kampo de kompara hindeŭropistiko. S., kiu naskiĝis en Zuriko, mortis en Berlino kaj estis entombigita en Zuriko.



Prelego de Eduard Schwyzer de 1905 eldonita en broŝuro en 1906

Krom sia debuta prelego pri la mondolingvoj en la antikva tempo, dum kiu S. priskribis lingvojn kun universala signifo kiel la antikva babilona, la lingvoj de la persa regno, la atika kaj la latina, la 9an de februaro 1905, do en la jaro de la unua UK, S. prezentis en Zuriko akademiecan prelegon pri la problemo de la universala lingvo ('Das Problem einer Universalsprache'). En tiu prelego (la teksto estas konservita), kiu baziĝis sur la verko *Histoire de la Langue universelle* de Couturat/Leau, S. rerigardis al la religiihistoria situacio de la antikva tempo, traktis la filozofiajn lingvojn de la 17a kaj 18a jarcentoj, provis doni difinon pri universala lingvo, analizis la argumentojn de vivantaj lingvoj koncerne ilian taŭgecon kiel universalaj lingvoj kaj karakterizis la internaciajn planlingvojn, kiuj tiam estis plej popularaj.

Kvankam S. kritikis la troigojn en la planlingva historio, kiu naskis strangajn kaj bizarajn lingvo-projektojn, li opiniis, ke la ideo de artefarita planlingvo principe estas realigebla kaj dezirinda por la komerco kaj tekniko, turismo kaj scienco, kaj ke estus domaĝe, se oni entute forlasus ĝin. S. eĉ vidis grandan avantaĝon en la adopto de neŭtrala universala lingvo, ĉar li kredis, ke tia lingvo progresigus la evoluon de la homaro. Laŭ S. ekzistis tri variantoj konsiderantaj la enkondukon de universala lingvo: morta (ekzemple la latina lingvo), vivanta (nacilingvo, ekzemple la angla aŭ franca lingvo) aŭ artefarita lingvo (ekz. Eo). S. ne timis, ke artefarita lingvo eĉ sia skriba disvastiĝo povus disdialektiĝi aŭ disfaldi en plej diversaj novaj lingvoj, kiel siatempe la latina lingvo, kiu eĉ produktis tute novajn etnolingvojn. Malgraŭ tiuj pozitivaj pritaksoj S. entute dubis pri la sukceso de artefarita planlingvo, pro diversaj kialoj: la lernejoj ne ĉesus instrui naciajn lingvojn malfavore al planlingvo, ĉar oni kredas, ke la enkonduko de planlingvo ne farus la ellernadon de naciaj lingvoj superflua. S. ankaŭ ne kredis, ke artefarita helplingvo povus krei originalan literaturon. Laŭ S. la kredo en la unusolan mondolingvon por la tuta homaro estus utopia, despli ĉar la adopto de tia lingvo verŝajne ne povus plenumi ĉiujn atendojn, kiujn oni postulus de ĝi; kaj nelaste la akcepto de neŭtrala universala lingvo bezonus multe da bonvolo flanke de la popoloj. S.

konkludis, ke finfine ne estus tiom malbone vivi kun la multaj vivantaj naciaj lingvoj samtempe, kiujn vojaĝantoj kaj fakuloj en diversaj landoj ĉiukaze devus lerni dum siaj aktivecoj internacaj.

→Antologio

### **SOMA (lingvo, 1938)**

Efemera planlingva projekto de *B. Rosenblum* en Basel, kiu en 1935 jam publikigis la lingvoprojekton →Fitusa.

### **TERSBOCA (lingvo, 1912)**

Efemera aposteriora (?) planlingva projekto elpensita de *M. Rotter* (Rothes), publikigita en Zürich (1912).

Bibl.: *M. Rotter: Die Weltsprache. Erdsprache – Tersboca.* Zürich 1912.

### **UNIVERSAL-ESPERANTO (lingvo, 1935)**

Unu el la multaj – kaj lastaj – reformprojektoj sur la bazo de Eo kaj antaŭaj reformprojektoj, ellaborita far →*René de Saussure* (1868-1943) kaj publikigita en Bern (1935).

Ŝanĝoj kompare kun Eo: *j, sh, ch, w, x,y, -n, -u, pli - min, la plej – la min, qar, ain, new, -or, nor, lor, kor, -er, anter, poster* ktp.

*Specimena teksto:* Foye vivis una reĵo, kay ti gerne havis bela nova vestun, ke hi elspezis sia tuta monu, por nur esti chiam bele ornamita. Hi ne zorgis pri sia soldaton, nor pri teatro ey chaso, excepte nur si lin donis al hi okazu montri sia nova vestun. (Andersen N., *La nova veston de la reĵo.* UEA, Bern 1935).

Bibl.: Antido [R. de Saussure]: «Universal-Esperanto» or Esperanto-«renovigita». Praktika solvo de l'interlingua problemo konforme al la postulon de la moderna vivo. Bern 1935.

→René de Saussure →Esperanto II →Bibliografio

### **WELTVERKEHRSSPRACHE (lingvo, 1932)**

Efemera (aposteriora?) planlingva projekto elpensita de *E. Ritter*, Ĝenevo 1932. Menciono troviĝas ĉe Monnerat-Dumaine (1960). Priskribo mankas.